1979

HUNGARA VIVO

4
1979
11,- Ft

KOMENCU ĈE SKALA!

NI ATENDAS VIN

de la 8-a horo ĝis la 19-a horo en nia sekcio de multspecaj industri–varoj

de la 7-a horo ĝis la 20-a horo en nia nutraĵ–sekcio

SKÁLA

Kliento–servo: 850–850

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193 H–1368
Aperas dumonate
XIX. jaro 1979. Nro 4
(86)

ENHAVO

Fejes, M.: Promeso pri nia futuro . . . 122
Fenyvesi, E.: Hej fervojo,kia ĝojo . . 124
Benczik, V.: „Ónjo Helena" en la Infanaj Kongresetoj 125
Rados, P.: „Porinfanaj" teatroj en Budapeŝto 126
Rados, P. A.: Gastado ĉe la Hungara Revuo 127
Tamkó-Siratό, K., *Weörös*, S.: Porinfanaj poemoj (*Huleŝ*, A.) 128
Móra, F.: Bela arbo de Kristnasko . . . (*Rados*, P. A.) 130
Gergely, M.: Infandesegnaĵoj – infananimoj 132
Halász, Z.: Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo 10. *(VHZs)* . . 134
Torda, I.: Jarcentoj de la hungara literaturo 2. (*Rados*, P. A.) 136
László, I.: Hungario kaj la Internacia Jaro de la Infano 139
Farkas-Tatár, É.: Panoramo 140
Barcsay, Zs.: Lerneja Esperanto-instruado en Hungario 142
Pionira Internacia Tendumado . . . 142
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 143
László, F.: Elstara agado de Stefano Széchenyi en la evoluigo de la hungarlanda akvomastrumado 2. 144
Vándor, K. – *Deák*, A. „Maton al lingva nekompreno...!
„Intervjuo kun olimpikoj (*László*, I.) 152
Kapitány, L.: Norvego fariĝinta hungara nobelo 155
Mihalkov, G.: Ekzameno sen risko . . 155
Recenzoj de *Benczik*, 156
Korespondi deziras, ... 158
Leterkesto, Krucenigmo 159

Sur la kovrilpaĝo sceno el la Hungara Ŝtata Pupteatro; Petőfi–Szilágyi: Johano la Brava

Serĉu liberan seĝon, kaj ...

eksidu por tri minutoj, Kara Kongresano en la Lucerna homosvarmo. Vi bezonas tiujn liberajn minutojn por ripozigi viajn laciĝintajn krurojn, kaj ankaŭ por legi tiun ĉi mallongan enkondukon, eble ne sufiĉe spritan, sed nepre utilan.

Tiu ĉi festa numero de nia revuo en via dokumentujo estas donaco de Hungara Esperanto-Asocio, kiu deziras kontribui per ĝi al la kongresa temo, kaj konigi al vi sian eldonaĵon.

Sur la komencaj paĝoj vi povas legi pri infanoj kaj Esperanto. Ĉu pri tio, kiel infanoj lernas la Internacian Lingvon en hungaraj lernejoj, ĉu pri speciala infana fervojo, ĉu pri hungaraj porinfanaj teatroj. Sur la paĝoj 128–129 vi trovas bukedon el la riĉa hungara porinfana poezio. Se tiuj specimenoj ekplaĉis al vi, ne hezitu iri al la Libroservo, kaj aĉeti la plaĉan volumeton *Hund-bazaro*, kiu enhavas 33 tiajn poemojn kun allogaj ilustraĵoj.

La serioj *Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo* kaj *Jarcentoj de la hungara literaturo* jam populariĝis ĉe niaj konstantaj legantoj: nun ni esperas konigi interesajn informojn pri nia historio kaj literaturo al pli vasta publiko.

La temo „Esperanto kaj sporto" ĉiam vekis la atenton de multaj esperantistoj. En tiu ĉi numero vi povas legi intervjuojn, faritajn kun olimpikaj ĉampionoj: interalie *kun la mondĉampiono de ŝako, la internacia grandmajstro-Karpov.*

Nun per salteto ni atingu la lastan paĝon de la revuo, kiu laŭ sia signifo estas fakte tute la mallasta. *Kvazaŭ reviviĝus LITERATURA MONDO* . . . – fanfaronas la titolo de la librolisto, tamen tio apenaŭ estas troigo. Dum la lastaj sep monatoj en Budapeŝto aperis *11 novaj Esperantaj libroj, sur entute pli ol 2000 paĝoj.* Tio signifas, ke eliris nova libro praktike en ĉiu dua semajno . . .

Dediĉu do pliajn kvin minutojn por trastudi la libroliston. Vin atendas veraj surprizoj, inter ili gravaj esperantologiaj verkoj, belaj infanlibroj, bonaj literaturaĵoj ktp. Estas tute certe, ke, transdoninte vian seĝon al alia laca kongresano, vi direktos viajn paŝojn al la Libroservo, por vidi, ĉu tiu riĉa listo estas nur malfruinta unua-aprila ŝerco aŭ palpebla – kaj aĉetebla – veraĵo? Tamen, inter la ensorĉaj libroj ne forgesu ankaŭ pri *Hungara Vivo*, kiu vin kondukis tien: abonante ĝin por 1980 kontraŭ *ekvivalento de 17,50 ned. gld.*, vi ricevos senpage la ĉi-jarajn numerojn, aperontajn en septembro kaj novembro.

Kara Kongresano, ankaŭ aliaj volus sidi iomete . . .

Promeso pri nia futuro

Vizito en la Tomori strato

Projekciitaj bildoj aperas sur la ekrano, eksonas magnetofono; demandojn sekvas respondoj, kompletigendajn frazojn kompletigoj. Brilantaj geknabaj okuloj atestas pri interesiĝo, ruĝetantaj vizaĝoj pri klopodoj. Arbaro de manoj leviĝas por sin anonci, la instruistino kun kvazaŭpatrinaj laŭdoj rekompencas la alparolojn – komenciĝis la Esperanto-studhoro en la e-a klaso de Budapeŝta bazlernejo. La aŭd-vidaj materialoj estas prilaboritaj kaj senditaj el FRG, far la Kibernetika Esplorinstituto de Paderborn. En vitrinoj sur la lerneja koridoro riĉa ekspozicio: kolektaĵo de esperantaĵoj el diversaj landoj . . .

Nek utopio, nek miraklo

Antaŭ ol la leganto pensus, ke li legas futurologian priskribon aŭ sciencfikcian utopiaĵon – mi devas plipreciziĝi la situacion: loko de tiu studhoro estas ĝenerala lernejo de Tomori-strato en Budapeŝto, la dato: 16-a de marto en 1979, la instruistino estas s-ino Jánosné Patay.

– Ĉu do jam realiĝis revo de miljaroj: internacia lingvo estas instruata ĝenerale en kadro de internacia kunlaboro? – Ne, tion ni ankoraŭ ne atingis. Sed laŭ la plej freŝa dokumento de HEA (Raporto por Jara Komitatkunsido) en la kuranta lernojaro Esperanto estas instruata krom en Budapeŝto en 16 departamentoj, en certaj lernejoj de pli grandaj urboj, kiel Kecskemét, Pécs, Gyula ktp; same en mezaj kaj etaj vilaĝoj kiel Endrőd aŭ Szirmabesenyő ktp. Laŭ la detala statistiko 1224 gelernantoj de bazlernejoj ricevas Esperanto-instruadon en siaj lernejoj, aliaj 250 lernas la Internacian Lingvon en kulturdomoj, respektive en fakrondoj de pionirdomoj.

El inter tiuj lernejoj unuavice estas menciinda la vizitata lernejo de Tomori-strato. Fondita en la jaro 1952 la lernejo antaŭ du jaroj festis sian 25-jaran jubileon kaj ankaŭ ĉijare ĝi jubileos; antaŭ dek jaroj, en 1969 komenciĝis tie instruado de Esperanto. Temas do pri lernejo nova, kiu tamen havas jam tradiciojn, rezultojn kaj spertojn ĉi-terene.

Emblemo kun pilko kaj verda stelo

La lernejo havas du specialaĵojn: ĝi estas registrata kaj rekonata kiel lernejo kun sekcioj por korpkulturo kaj por Esperanto. La sport-sekciaj klasoj ricevas specialan edukon pri atletiko, gimnastiko kaj pilkludoj, por prepari la gelernantojn precipe por la sportbranĉo manpilko. Rezultoj de tiu sekcio estas en vasta rondo konataj: la sportklubo Vasas gajnis jam plurajn eminentajn sportistojn por siaj teamoj konkurantaj en la landa 1-a kaj 2-a klasoj.

Ankaŭ gelernantoj de Esperanto-sekciaj klasoj atingis nivelon altan. Pri tio zorgas krom la lerneja direktoro s-ro János Ingusz kaj du entuziasmaj pedagogoj: instruistino s-ino Patay kaj lingvoinstruisto s-ro Ferenc Balogh. Dank' al ilia oferemo, kaj diligentemo de la gelernantoj la esperantistaj Tomori-anoj de jaro al jaro kontribuas al programo de Budapeŝtaj Zamenhof-vesperoj, kaj ili ne nur partoprenas, sed ankaŭ gajnas; kiel ekzemple pasintjare la klaso 8/b, respektive ties teamo atingis unuan lokon en la Tutlanda Studkonkurso de Esperanto. Ankaŭ teamo de alia klaso portis hejmen pokalon gajnitan pro la sukcesa partopreno.

Ambaŭ sekcioj do funkcias kun egale bona rezulto. Emblemon de la lernejo ornamas ankaŭ verda stelo kaj pilko, formantaj „O" literojn de la nomo Tomori, kaj simbolantaj la du specialaĵojn. Tamen, ŝajnas al mi, ke la hungara publiko pli bone estas informita pri la funkciado de la sporta sekcio ol pri tiu de Esperanto. Per kio vi klarigus tion? – mi metas la demandon al s-ro direktoro János Ingusz.

– La sporto ĝenerale allogas pli grandajn amasojn, ol lingvaj demandoj aŭ problemoj de instruado. Kaj ĉe la sporta sekcio estas pli bona ankaŭ la organizo: la elekto de la gelernantoj okazas jam en la infanĝardeno, kaj la pli talentaj gelernantoj ne perdiĝas, ilin edukas plu la sportkluboj. Simila kontinueco ne estas ankoraŭ organizita koncerne niajn Esperanto-sekciajn klasojn; la gelerantoj ricevas ĉe ni bonan bazon, sur kiu poste konstruiĝas nenio, ja en la diversaj mez- kaj faklernejoj, kien niaj geknaboj disiras – ili nur esceptokaze trovas eblon plu studi aŭ praktiki E-on, eventuale en kadro de fakrondoj. Ne perdiĝas tute niaj esperantistaj geknaboj, sed ankoraŭ ne venis la tempo, ke ili povu plene disvolvi siajn kapablojn, utiligi la jam akiritan lingvo-scion. Kvankam ili pere de membreco en Pionira Asocio apartenas ankaŭ al HEA, tamen la Junulara Komisiono ankoraŭ ne trovis la konvenan organizan formon, rimedojn, per kiuj ili estus kunligeblaj al la movado.

– Mi sciis tiel, ke viaj gelernantoj lernas laŭ lernolibro de Szerdahelyi, konvene al la pli fruaj internaciaj eksperimentoj. Ja via lernejo estas ankaŭ lernejo de praktikado por studentoj de Esperanto-fako de la Budapeŝta Universitato ELTE. Kaj nun en la 3-a klaso mi vidis lernolibron de P. Korte, taskofoliojn kaj aŭd-vidajn materialojn prilaboritajn far la Kibernetika Esplorinstituto en Padernborn. Kion signifas tio?

– Komencon de nova internacia eksperimento: la instruadon en tiu ĉi studjaro ni komencis jam laŭ modelo Paderborna. Ankaŭ FRG-aj, Franciaj, Belgiaj kaj Italiaj lernejoj partoprenas la eksperimenton. Tiucele aŭtune ekzemple instruis ĉe ni s-ro Hermann Behrmann, kunlaboranto de la Esplorinstituto. En la supraj klasoj ni restis ĉe la jam pruvite bona lernolibro de Szerdahelyi.

La internacia kunlaboro fakte kontribuas al la sukceso de instruado, ankaŭ al popularigo de la Internacia lingvo. Pri ampleksoj de tiaj kontaktoj atestas ankaŭ notoj en la gastlibro de la lernejo, kaj la salutoj kaj bondeziroj ricevitaj okaze de la 25-jara jubileo de la lernejo: ili alvenis el 26 landoj.

Ne simpla studobjekto...

S-ro Ferenc Balogh jam de pluraj jaroj estas klasgvidanto en supraj (5–8) Esperanto-sekciaj klasoj. Teamo

Esperanto studhoro en la klaso 5/b. Ĉe la katedro s-ro Ferenc Balogh

Studhoro laŭ Paderborna modelo. S-ino Patay instruas en la 3/b klaso

de lia klaso estis gajninto de la pasintjara landa studkonkurso.

– Ĉu vi ne spertas fakan ĵaluzemon aŭ enviemon flanke de instruisto de rusa lingvo pro viaj sukcesoj atingitaj en instruado de Esperanto?

– Tute ne, ja mi estas ankaŭ instruisto de rusa lingvo. Sed eĉ, se la rusan instruus alia kolego, ankaŭ li devus rekoni la faktojn, t.e. facilecon de Internacia lingvo kompare al la rusa, same tiun helpon, kiun donas lernado de Esperanto antaŭ ol lerni alian lingvon. La gelernantoj, preparitaj far kolegino Patay ricevis bonan bazon en la tria kaj kvara klasoj por ambaŭ lingvoj. Tamen facileco de la internacia lingvo, kaj la al ĝi ligitaj ebloj de internaciaj kontaktoj kuraĝigas ilin, kaj ili povas jam ekuzi Esperanton, kiam ili nur konatiĝas kun la cirila alfabeto.

– La funkcianta Esperanto-fakrondo, la en pionira organizo plenumitaj E-o provoj (rekonataj ankaŭ flanke de la Pionira Asocio), la el Manchester organizita Kastora klubo kaj tiu de Esperantistaj Geonkloj, kiuj konvenas al interesiĝo, inklinoj de tiuj klasoj – ankaŭ instigas niajn gelernantojn por diligenta lernado. La vojaĝoj al eksterlando, kiujn ni faris antaŭ kelkaj jaroj – kun gelernantoj, jam finintaj nian lernejon – efikas ankaŭ al la nunaj klasoj. Al Bulgario mi mem gvidis grupon dufoje, al Slovaka Paradizo mia kolegino, s-ino Patay. Kvankam Esperanto en la sekciaj klasoj estas deviga studobjekto, tamen ĝi ne estas simple unu el la lernendaj studobjektoj, ĝi estas ankaŭ laŭ la gelernantoj lerninda . . .

Kvar Kastoroj

En la ĉambro, havanta la subskribon „Esperanto-kabaneto" (tiu estas ejo por kunvenoj de Esperanto-fakrondo) kvar gelernantojn mi trovas: Péter László, Edit Ferenczi, Erika Kovács kaj László Schnidt. Ĉiuj estas el la sesa klaso, ĉiuj estas brunaj kastoroj; ilia korespondado tuŝas duonon de Eŭropo de Latvio ĝis Jugoslavio. Nia konversacio okazas en la hungara lingvo, sed ili komprenas la pli simplajn demandojn ankaŭ en Esperanto, ĉe, la plej kuraĝa, László Schmidt ankaŭ respondi ekprovas Esperante.

– Mi venis de Hungara Vivo. Ĉu vi scias, kio ĝi estas? – Jes, ni vidis ĝin, kaj aŭdis pri ĝi de niaj instruistoj. Sed ni havas niajn proprajn revuojn geknabajn: *Juna Amiko* kaj *Pioniro*. Ambaŭ gazetojn ni povas utiligi en la lernado.

Al demando, kio estis ilia plej granda travivaĵo koncerne Esperanton – ĉiuj kvar parolas pri PIT, Pionira Internacia Tendaro en la Pionira Urbo Zánka, kie ili pasintjare somerumis en Esperantista Subtendaro gvidata de esperantistaj pedagogoj: kune kun ĉeĥaj, polaj, jugoslaviaj kaj germanaj esperantistaj pioniroj.

Iliaj gepatroj ne estas esperantistoj, sed al mia demando la geknaboj respondas, ke ili proponos iam al siaj gefiloj lerni la internacian lingvon. – Ĝis revido geknaboj, ĝis revido samideanetoj!

* * *

Du jarojn pasigos ili ankoraŭ inter la muroj de la lernejo, ankaŭ por alilernejaj kaj alilandaj geknaboj iam finiĝos la elementaj studoj.

– Kaj ĉu poste? Ĉu ili trovos eblon en la fak,- kaj mezlernejoj krom profesi-lernado okupiĝi pri la internacia Lingvo, aŭ Esperanto restos por ili bela memoro ligita al knabaĝo, nur tiun koloriginta?

Nun, okaze de Internacia Jaro de la Infano ili estas en la centro de publika interesiĝo. Ni ne lasu ilin foriĝi el tiu ĉi fokuso, ni trovu la kielon por ligi ilin al la movado. Kontinueco de ilia esperantisteco garantias tiun de la movado, tiun de internacilingva ideo. Ilia futuro estas ankaŭ nia futuro.

Márton *Fejes*

La titolo de tiu ĉi artikoleto ne estas nura reklam-slogano, sed efektiva vero: dum la lastaj ses jaroj pluraj miloj da junaj kaj malpli junaj lernantoj de Esperanto uzis tiun ĉi allogan revueton, kiu tamen restas ankoraŭ ne sufiĉe disvastiĝinta en Esperantujo.

Ĝi aperas en Hungario, faksperte redaktas ĝin hungaro, profesoro Géza Kurucz, tamen ĝi ne estas nur „hungara entrepreno". La redakcio estas internacia, kun vere paradaj nomoj, kiel tiu de Marjorie Boulton aŭ Baldur Ragnarsson.

Juna Amiko eliras trifoje dum la jaro, sur entute 72 paĝoj, kaj volas servi unuavice la infanojn, kiuj lernas la Internacian Lingvon. Ĝiaj tekstoj estas variaj, viglaj, interesaj, verkitaj en tre simpla lingvo. Tamen, la simpleco neniam signifas primitivecon. Ne mirinde do, ke ĝi bonege taŭgas ankaŭ por plenkreskaj komencantoj, kiuj same ĝue legadas ĝin, kiel tion faras infanoj.

Se vi ne konas ĝin ankoraŭ, la Internacia Jaro de la Infano prezentas bonan eblon por ekaboni Junan Amikon. Abonojn akceptas en socialismaj landoj ĉiuj poŝtoficejoj, en aliaj landoj UEA kaj ĉiuj grandaj libroservoj. Partoprenantoj de la UK povas aboni ĝin ĉe la kongresa libroservo.

Hej fervojo, kia ĝojo...

Dimanĉa mateno, sunbrila eĉ tra vintra vualo, vokas ekskursantojn, konkursantojn el la metropolo al la neĝaj montetoj. *Bonan aeron!* ankaŭ vi alsupren? sonas ofte en *Buda* ĉe aŭtobushaltejoj – kvankam oni aludas certe ne la Argentinan Buenos Aires-on – kaj la homa svarmo ekveturas al du malsamaj direktoj. Ĉu? Kaŭzo simpla: per monta fervojo la negkovritaj suproj alireblas de du finpunktoj. Ĉiu elektas sian konvenan haltejon, de kie li ekiros perpiede aŭ perskie laŭ sia vojo fari sian sporton.

Banala temo, ĉu ne? Mi konfesas tuj, ke vi pravus; eĉ se nur kelkaj metropoloj troviĝas, kiuj havas „urban monton" propran, oni skribu pri tio prefere en turisma prospekto . . . Sed mi ne kutimas „verki" prospekton. La intenco *raporti pri io speciala* sidigis min antaŭ la tajpilon. Kompreneble ne la ekskursado, sed la fervojo estas *nekutima!* Kvankam ja de malproksime videble ĝi estas ekipita per ĉia necesa teknika instalaĵo, funkcias laŭhorare, do ĝi estas *vera* fervojlinio – 12 km longa –, posedata de la Hungara Ŝtatfervojo. Sed mi ne foruzu vian paciencon: tie ĉi *deĵoras infana personaro.* 10–14 jaraj geknaboj kiel fervojistoj en uniformo. Por ludi? Jes! Amuze labori? Same. Lerni? Certe, precipe la fervojistan profesion, por plenkreskinte eventuale labori ĉe la fervojoj.

Atingante la suban finstacion (alteco 230 m super la mara nivelo) ni petas informon kaj aĉetas la fervojbiletojn de la serioze kondutantaj, etaj fervojistoj, ĉe la kutimaj fenestretoj. Malpermesite eniri la deĵorĉambrojn, sed mi kuraĝe trarigardas la fenestrojn, kaj vidas ankaŭ tie ĉi la etajn fervojistojn manipuladi la mul-

tajn ilojn de la signalado, telegrafado kaj trafik-direktado. Sonorado . . . dizellokomotivo tiras en la halon la etŝpuran trajnon. Belaj vagonoj, havantaj grandajn fenestrojn kaj 60 sidlokojn, sur kiuj ankaŭ ni okupas nian lokon. Lau tute ordinara fervojista disciplino ĉio iras glate, la trafikisto, ruĝĉapela knabino, laŭorde faras la signon, kaj ni ekveturas. Baldaŭ ni superveturas soseon, por poste enruliĝi en kurban tunelon, kaj niaj kunvojaĝantaj knaboj ekkrias pro amuzo. Ili scias – sentas ja, ke tiu fervojo estas kvazaŭ ilia ludilo, ilia propraĵo. Estas vere tiel, valora donaco por la junularo, kiu ĝenerale ŝatas ludi per fervojo. Kaj la infan-pasaĝeroj, kaj la plenaĝuloj (ho! nostalgiplenaj ni) admiras la panoramon de la ĉefurbo . . . sed jam venas la severmiena konduktoro kontroli, trui la biletojn, kiujn prezentas al li aŭ ŝi prefere la infanoj de la veturantaj familioj.

Ĉe haltejoj denove ĉio okazas laŭregule, sen ia diferenco de aliaj trajnoj. La 760 mm-a trakŝpuro ebligas sekuran rapidecon de 30 km/h, kaj nia trajno trankvile grimpas tra kurbiĝoj supren, de valo tra arbaro pli kaj pli alten; ruliĝas tra 7 haltejoj kun belstilaj stacidomoj, antaŭ la tie deĵorantaj „pionir-fervojistoj". 5–600 diligentaj lernantoj, anoj de la infan-organizo de „junpioniroj", elektitaj (granda honoro!) en siaj pionir-trupoj kaj fake instruataj, deĵoras tie (unu tagon en du semajnoj), farante ĉiaspecan fervojan laboron, kaj ankaŭ poŝtoservon. La pasaĝeroj ŝanĝiĝas ĉe la haltejoj, kelkaj aĉetas pluan bileton por ĝui la vojaĝon ĝisfine. Apud la reloj multaj skias, permane salutas nin, veturantajn ankoraŭ, kaj nia ĉarma konduktorino denove kontrolas kaj vendas biletojn. La apudrelaj signaliloj removiĝas malantaŭ nia trajno, barieroj leviĝas same ĉe vojkruciĝo. En alteco de 470 m ni atingas la finstacion „Széchenyi-monto", preteras remizon, aliajn trakojn kaj trajnojn. Haltante, mi adiaŭas la blondan konduktorineton, kiu havas jam respektindajn 13 jarojn kaj eminentajn lernejajn rezultojn – kiel ŝi, ekster-ofice, malkaŝis tion je miaj scivolaj demandoj, – kaj ridetante forlasas min por raporti laŭregule pri la veturo, per dokumentoj preskribitaj. Nur de proksime mi vidas la solan „grandan" fervojiston, la staciestron, ĵus kontrolantan la mekanismon de la signaliloj. Mi prenas miajn skiojn, surfiksas ilin, kaj ekmarŝas al la neĝa deklivo kun la aliaj sportantoj, sur la kristale brilanta mola neĝtavolo.

Ervin *Fenyvesi*

»Onjo Helena« en la Infanaj Kongresetoj



Onjo Helena

Vizitantoj de la Infanaj Kongresetoj dum la lasta jardeko ofte povis renkonti modestan, silentan sinjorinon, kiu altiris la atenton al si nur per sola afero, nome, ke ŝi troviĝis ĉiam en viva ringo de almenaŭ duondeko da infanoj diversnaciaj. Ŝi ĉiam portas nomtabulon kun la familiara surskribo „Onjo Helena", kiu tamen malmulte informas, kiu vere ŝi estas?

Onjo Helena nomiĝas „oficiale" s-ino Helena Hegedüs, ŝi estas instruistino el la hungara urbo Pécs, kaj antaŭ kelka tempo UEA donis al ŝi konstantan komision pri la preparlaboroj kaj gvidado de la Infanaj Kongresetoj dum la venontaj jaroj. Estas utile do prezenti ŝin al nia legantaro, kies grandega plimulto jam superis la aĝon, ankoraŭ akcepteblan por la organizantoj de Infana Kongreseto, kaj sekve ne havas la eblon konatiĝi kun ŝi tie.

Kiam vi partoprenis unuafoje Infanan Kongreseton?

Tio okazis en la jaro 1971, en St. Mary' Bay (Britujo). Mi havis tie grupeton de ses infanoj el kvar landoj. Estis inter ili ankaŭ du britaj infanoj, kiuj – alvenintaj el diversaj regionoj de Britujo – ne bone interkompreniĝis per la angla lingvo, do, ili *devis* uzi Esperanton.

Estis granda surprizo por mi, kiam en la unua kunveno de pedagogoj evidentiĝis, ke mi devos fari memstaran ekskurseton kun „miaj" infanoj. Imagu: mi ne parolas la anglan lingvon, kaj mi estis la unuan fojon en Britujo, do, tute ne konis la urbon, eĉ ne la specialajn britajn kutimojn koncerne la etajn, sed tre gravajn praktikaĵojn de la ĉiutaga vivo. Sed dank' al tre afabla kunlaboremo kaj bona konduto de la infanoj, tiu ekskurseto brile sukcesis, kaj plurfoje ni eĉ ripetis ĝin. Ni vidis multajn amuzajn aĵojn: ondantan maron, sur tegmento de feriejo gipsan katon, kiu estis kaptanta gipsan muson ktp.

Kiom da kongresetojn ĝis nun vi partoprenis?

Lucerno estos la kvina: mi ĉeestis en Kopenhago, Hamburgo kaj Varno. En la ĝisnunaj kongresetoj ĉiam mi sukcesis fari la kune pasigitan semajnon memorinda por la infanoj, kaj ĉiufoje la adiaŭo estis tre-tre malfacila – ne nur por ili, sed ankaŭ por mi.

Ĉu la partopreno en la gvidado de la Infanaj Kongresetoj havigis al vi, kiel pedagogino, iujn fakajn sperto jn? Aŭ vi konsideras vian tiukampan laboron pure hobia?

Tute ne hobia: ĉiam estis tre interesa faka travivaĵo por mi labori en tiel unika medio. Dum la semajnoj de la Infanaj Kongresetoj mi povis tre konkrete sperti la denaskan kaj sinceran inklinon de la infanoj al la internacieco. Estis ĉiam interese vidi, ke post kelka hezitado kiel „soife" ili proksimiĝas unu al la alia, kiom ili sopiras havi amikojn el landoj malproksimaj, pri kiuj la plejparto havis nur lernolibrajn konojn. Malmultaj pedagogoj povas fieri pri tiaj spertoj! Sed kompreneble, la kongresetoj estas kortuŝaj travivaĵoj ankaŭ por mia „esperantista memo": estas agrablega afero aŭdi nian lingvon el la buŝo de tiuj etuloj.

La Universalaj Kongresoj estas la plej grandaj kaj entuziasmigaj manifestaĵoj de la Esperanto-movado. Por tre multaj esperantistoj la kongresa semajno estas travivaĵo, pri kiu ili neniel rezignus. Ĉu via koro ne doloras, ke vi devas esti for de la bunta kongresa kavalkado, kaj ke mankas al vi eblo partopreni ĝiajn unikajn, interesajn programojn?

Nu, ni ne estas komplete forfermitaj disde la Universala Kongreso: dank' al la labordivido inter la deĵorantaj pedagogoj, ni povas ĉeesti la programerojn, kiuj pleje interesas nin. Sed partopreni la tutan Universalan Kongreson vere ne eblas. Tamen, ne „kompatu" nin pro tio, ĉar ni havas valoregan rekompencon: la ĝojon kaj ridojn de ne malpli interesa kaj unika infankolektivo.

V. B.

14-a Infana Kongreseto en Hamburg-Hansbüttel

Matematikisto serĉas kontaktojn kun samfakuloj, por korespondi pri instruado de matematiko en porinstruistaj institutoj kaj bazlernejoj.

Zoltán Kovács, H–1037 Budapest, Mátyáshegyi út, 22.

»Porinfanaj« teatroj de Budapeŝto

Scenoj el Infanteatro Bartók

Mozart: Bastieno kaj Bastiena (Ildikó *Hűvösvölgyi* kaj Tibor *Sipeki*) **Mark Twain: Almozulo kaj Regido** (Teréz *Várhegyi* kaj Zsuzsa *Pálos*)

En la Internacia Jaro de la Infano natura estas la intereso pri la institucioj, servantaj kulturbezonojn de la juna generacio.

En la hungara ĉefurbo funkcias du teatroj, ludantaj ĉefe al geknaboj. Nomo de la unua estas *Budapesti Gyermekszínház* (Budapeŝta Infanteatro), tiu de la alia *Állami Bábszínház* (Ŝtata Pupteatro). La dua nomo ne sonas jam fremde al esperantista leganto, ĉar oni multe skribis pri ĝi en la Esperanta gazetaro. En ĝi ja bone funkcias esperantista grupo, rolanta plurfoje en PIF-oj kaj UK-oj. Sed pri tio iom poste. Unue ni parolu kelkajn vortojn pri la Budapeŝta Infanteatro! Ĝi funkciis de 1960 ĝis 1975 kiel *Infanteatro Bartók*, kaj en la jaro 1975 ĝi ekhavis sian hodiaŭan nomon.

Teatraĵoj kaj „malregulaj literaturhoroj"

Komence la teatro ĉiujare prezentis po kvar novajn teatraĵojn, en la 70-aj jaroj tiu kvanto altiĝis je 5–6. Tio signifas, ke dum sia historio la teatro prezentis al la Budapeŝta kaj provinca infanaro proksimume cent teatraĵojn. Unu duono de tiu ĉi kvanto estas klasikaĵoj, la alia duono verkoj de nuntempaj aŭtoroj. Inter la prezentitaj aĵoj troviĝas kaj originalaj dramoj kaj surscenigitaj epikaĵoj (ĉefe klasikaj kaj porjunularaj romanoj).

Aparta interesa laborterено de la teatro estas aranĝado de t.n. „malregulaj literaturhoroj" en la lernejoj. Tie figuras literaturaĵoj precipe el la lerneja studmaterialo en arta interpretado. La infanoj rajtas demandi, interparoli kun la geaktoroj pri problemoj de la prezentado. Laŭ tiu ĉi iniciato ankaŭ alia Budapeŝta teatro – Népszínház (Popolteatro) – faras similajn prezentadojn.

En la ĉijara programo de Infanteatro troviĝas *Sorĉbastoneto* de hungara verkisto György Turián por malgrandaj infanoj, surscenigo de *Tom Sawyer* de Mark Twain por pli aĝa spektantaro. Granda furoro estis verko de soveta aŭtor-duopo G. Roŝal kaj A. Taŝibajev *Tapiŝo de Ĝomart*, surscenigante antikvan kazaĥan legendon.

Al la 60-a datreveno de la Hungarlanda Konsilia Respubliko en marto kaj aprilo la teatro ludis 70-minutan prezentadon konsistantan el „historia revuo" kaj unuakta alegoria teatraĵo de hungara revolucia verkisto Andor Gábor pri la blanka teroro. En aprilo grandan sukceson havis opero de Mozart *Bastieno kaj Bastiena*, kiun la muzikisto-koloso komponis en 12-jara aĝo. Kune kun ĝi la teatro prezentis ankaŭ operon de hungara komponisto Zdenkó Tamási: *Gastoj*.

Al la multjara sukcesa ludado de surscenigo de romano far Mór Jókai *La Ora Homo* kaj *Oz, la granda sorĉisto* de Frank L. Baum aliĝas novaj teatraĵoj, prezentitaj ĉijare okaze de la Internacia Jaro de la Infano.

Multaj el la teatraĵoj estas t.n. „staggione"-ludoj. Tio signifas prezentadojn kun maksimume ok rolantoj kun porteblaj, tre plaĉaj kulisoj. Kun tiuj teatraĵoj eblas iri al lernejoj, kulturdomoj kaj prezenti ilin ekster la teatraj muroj.

La teatro ĉiumonate havas meze po 40 prezentadojn. Ĉiun spektas meze po 600 infanoj, do entute 2400 geknaboj faras ĉiam paŝon por ekami la teatron, por ekhavi bezonon pri kulturiĝo.

Pupoj por infanoj kaj plenkreskuloj

La alia „porinfana" teatro, la Ŝtata Pupteatro, kiu ekzistas ekde 1947, havas sian hodiaŭan nomon depost la aliŝtatigo, do ekde 1949. Ĝi havas programon ĉiam el 35–40 teatraĵoj, faras ĉiujare po 1500 prezentadojn, kiujn entute vizitas jare duonmiliono da spektantoj. De mardo ĝis vendredo la Ŝtata Pupteatro ludas en du ejoj kaj ankaŭ en la provinco. La teatraĵoj post kelkaj jaroj „ripozas" 2–3 jarojn, kaj poste renovigitaj kun novaj kulisoj, novaj pupoj ili denove estas ludataj. Tio estas racia tiom pli, ke intertempe kreskas nova generacio, kiu ankoraŭ ne vidis la „malnovaĵojn". La teatro tamen de tempo al tempo faras novajn prezentadojn, kiuj ĝenerale estas sukcesaj.

Funkcio de la Ŝtata Pupteatro estas unuavice esti infanteatro, tamen ĉiulunde ĝi havas „plenkreskulajn" prezentadojn, kiuj ĉie en la mondo estas furore ludataj. Ekzemple ĉijare en Britio (en Anglio kaj Kimrio), kie la teatro prezentis sian t.n. *Koncertprogramon*. En tiu programo troviĝas baleto de Bartók *Reĝido el ligno, Akto sen parolado* de Beckett, *Aventuroj* de György Ligeti kaj *Petruŝka* de Stravinskij.

En la infana repertuaro troviĝas surscenigoj de verkoj far hungaraj klasikuloj, kiel ekzemple *Johano la Brava** de Sándor Petőfi, *Rozo kaj Violo* de alia hungara elstarulo de la 19-a jarcento, János Arany, *János Háry* de Zoltán Kodály. Alia parto de la prezentataj verkoj estas aĵoj far eksterlandaj aŭtoroj, kiel ekzemple, *Oz, la granda sorĉisto* de Frank L. Baum, *La mistera amiko* de V. Lifŝic kaj A. Kiĉanova. Grava parto de la repertuaro estas surscenigoj de la klasikaj temoj – *Gulivero, Cindrulino, Tri porkidoj* –, al kiuj aliĝas novaj verkoj de nuntempaj hungaraj verkistoj. Tri titolo el la lastaj: *Kököjsi kaj Bobojsa* de Sándor Török, *Mistero en Anasejo* de Gyula Urbán, *Malkuraĝa Tigrido* de Eszter Tóth.

Kvankam la nuna artikolo prezentas la pupteatron, kiel porinfanan instituc ion, ne estas malinterese vicigi kelkajn aŭtorojn de la „plenkreskulaj" prezentadoj: Sergej Prokofjev, Maurice Ravel, Béla Balázs, Dino Buzatti, Sławomir Mrożek, W. A. Mozart.

*Nia frontpaĝo prezentas scenon el tiu teatraĵo.

Iom da esperantismo

Raporto pri la Budapeŝta Ŝtata Pupteatro en Esperanto-revuo ne estus fakte kompleta, se ne estus menciita agado de la tiea Esperanto-grupo, gvidata de reĝisorino Anna Bánd kaj aktoro-reĝisoro Roberto Bánky. Ili debutis en Esperantujo en 1966 dum la 51-a UK en Budapeŝto, kie ili prezentis pupteatran varianton de Andersen-fabelo, nome tiun de *La sorĉa fajrilo* kaj krome ludis – ne perpupe – teatraĵon far Marjorie Bulton *Ĉu esti aŭ ne esti?* (ambaŭ sub reĝisorado de A. Bánd).

Poste komenciĝis la ludadoj sur scenejoj de Pupteatraj Internaciaj Festivaloj (PIF-oj). En 1968 la hungaraj pupistoj prezentis ankaŭ tie *La sorĉan fajrilon*, en 1969 *La oran ŝlosilon* de A. Tolstoj kaj Zoltán Jékely. En 1970 sur la scenejo de PIF ludis nur unu hungaro, Roberto Bánky. Li prezentis tri ombroludprogramojn. Ili estis: *La fiŝisto kaj la lunarĝento* de Béla Balázs, *Tri oraj haroj de l' diablo* de Grimm kaj hungara popolludo en tralaboro de R. Bánky, *Laĉjo Heroo*.

En 1971 jam denove ludis tuta grupo sub estrado de A. Bánd. Ilia programo estis porinfana „detektiv-historio" far Gyula Urbán, *Mistero en Anasejo*. Post du jaroj tion sekvis „duobla" klasikaĵo: pupteatra varianto de Shakespeare-a *Somermeznokta sonĝo*, tradukita de K. Kalocsay. La prezentadon reĝisoris A. Bánd. En 1975 la Pupteatran Internacian Amatoran Festivalon partoprenis denove R. Bánky kun solistprogramo titolita *Pupcirko*. Tiun ĉi programon li prezentis ankaŭ en la Kopenhaga UK kaj en 1977 dum la tradicia PIF.

La lasta rolado de la Esperanto-grupo de la hungaraj pupistoj estis prezentado de *Johano la Brava* de Dezső Szilágyi laŭ la mondfama epopeo de Sándor Petőfi. La ludon reĝisoris Gyula Urbán.

Ĉiu rolado de la Hungara Ŝtata Pupteatro en PIF-oj gajnis premiojn, el kiuj ni menciu nur la lastajn. En 1978 ili ricevis 3 grupajn kaj 2 personajn premiojn. Nome la unuajn tri por reĝisorado, animigo, teatra parolo, la aliajn du por la elstara aktorado (Miklós Dörögdi) kaj por la plej bona uzado de Esperanto sur kaj eksterceneje (Roberto Bánky).

Gratulante niajn kolegojn, ni ne forgesu: *ili ludis ne malgravan rolon en tio, ke hodiaŭ la plej evoluinta branĉo de la Esperanto-teatro estas la „pupismo"*. Dankon al ili!

P. *Rados*

Gastado ĉe la Hungara Revuo



En Hungario aperas kelkaj ne-hungarlingvaj gazetoj kaj revuoj. La plej konata el ili eksterlande estas eble *Magyar Szemle* (Hungara Revuo). La hungarlingvan titolon scias fakte sole la redaktoroj, ĉar sur la kovrilo legeblas nur ĝiaj alilingvaj variantoj: *Hungarian Review* (la angla), *Vengerskie Novosti* (la rusa) *Revue Hongroise* (la franca), *Hungría* (la hispana), *Przeglad Wegierski* (la pola).

Eldonado de tiu ĉi revuo komenciĝis en 1955, unue ĝi havis nur du eldonojn, anglan kaj rusan, poste aligis al ili la franca kaj la hispana. Novulo inter la eldonoj estas Przegłąd Węgierski, kiu ekaperis pasintjare.

„Nia revuo atingas legantojn en proksimume 80 landoj – rakontas ĉefredaktoro Gábor Vajda. – *Ĝi aperas ĉiumonate sur 32 paĝoj, kun multaj bildoj, fotoj, inter kiuj estas pluraj koloraj. La tuta eldonkvanto estas pli ol 160 mil. ekzempleroj. En la disvastigo de la revuo multe helpas la hungaraj diplomatiaj misioj kaj societoj flegantaj amikajn rilatojn kun Hungario, kiel ekzemple la Franca-Hungara kaj la Belga-Hungara Amikaj Asocioj.*

La leganto en la Hungara Revuo trovas artikolojn pri la kulturo, scienco, ekonomio, eĉ pri sporto kaj muziko. Ni volus montri la lokon de Hungario en la mondo, informi la legantaron pri politikaj strebadoj de nia lando, montri Hungarion estintan, estantan kaj eble ankaŭ la estontan. En la redaktado ni atentas pri diverseco de la interesiĝo en tiuj landoj, en kiuj nia revuo estas legata. Tiel proksimume unu triono de la enhavo estas varia en la diversaj eldonoj."

La ĉefredaktoro informas la interesiĝantojn: specimeno de Hungara Revuo estas havebla pere de diplomatiaj misioj de Hungario, aboni la revuon oni povas ce entrepreno Kultúra kaj ĝiaj perantoj.

La redakcio foje ricevis leteron de fervora esperantisto, kiu postulis ĉesigon de la anglalingva eldono en la nomo de batalo kontraŭ la lingva imperiismo. Li ricevis respondon, ke la revuo ne rajtas malhavigi de si la legantaron, kaj krome, ke en Hungario aperas Esperantlingva revuo, nome *Hungara Vivo*.

Aldone ni povas diri, ke la rilatoj inter la du revuoj estas vere bonaj, eĉ amikaj. Antaŭnelonge en Hungara Revuo aperis informo pri HV far Mihály Gergely. La artikolo citis favoran opinion pri la hungara literaturo de William Auld, en kiu li diris: la konon de la hungara literaturo li ŝuldas al Esperanto.

Sed tio ne estas ĉio, ĉar en la *Hungara Vivo* jam delonge aperadas artikol-serio pri la hungara historio kaj antaŭnelonge ekaperis ankaŭ alia serio pri la hungara literaturhistorio. Tiuj materialoj unue aperis en la Hungara Revuo, kaj de tie ni prenas ilin kun afablaj permeso kaj helpo de niaj tieaj kolegoj.

Péter András *Rados*

Porinfanaj poemoj de

tradukoj de Adalberto Hules

ĈI ĈEVAL', ĈU NE, LAŬDINDAS?

Ĉi ĉeval', ĉu ne, laŭdindas?
Ĉiupaŝe ĝin bril' vindas.
Ĝi similas je kur' venton,
ĝi superas je prez' centon.

Se ĉeval' mia danc-iras,
sur ĉiel' ĉiu stel' miras.
Se ĉeval' mia eksaltas,
mem la sun' pro mireg' haltas.

S. W.

HOMOJ, HE, VI HOMOJ! . . .

Homoj, he, vi homoj foraj,
arbarrandaj, bonhumoraj!
Ĉu ĝardenoj viaj floras?
Ĉu la pom' kaj pir' koloras?
Vi min inter vi honoru,
kaj ni kune ridu-ploru!
Mi forpelos de aŭtoro
birdojn, nubojn per sonoro,
kaj post pluv' mielon oran
melkos mi tiliodoran.

K.T-S

FRAMBO

Bedaŭrinde
la langusto
estas blinda
je frambgusto.
Konus frambon
la langusto,
movus gambojn
en Aŭgusto,
kaj anstataŭ
langustumi
irus baldaŭ
frambgustumi.

K.T-S

LUM'
Kristnaska poemo

Lumas la lumil',
unu, du kaj mil.
Ĝis fermiĝas la okuloj
kaj eksonĝas la etuloj
en ĉambretoj
en ĉambregoj
pompu lampo-bril'!

Lumu ĉiu stel'
per brilega bel'!
Estu ĉiu hom' feliĉa
en land' riĉa
kaj malriĉa
pacmiene kaj serene
brilu la ĉiel'!

K.T-S

SALUT'!

Ĉu lud'?
Ĉu nud'
el put'?
Kia
prelud'!

Kun
paraŝut'
al sud' . . .

En poŝ'
valut',
post
minut'
mamut'
je mut' . . .

Br . . . br . . . brr . . .

Sufiĉas
alud'.

Salut'!
Salut'!

K.T-S

SE TEMPEST' VENAS EL ALTO

Se tempest' venas el alto,
gardi min, frat', vi ne ĉesu.
Se plenlun' paŝas en frondoj,
fratinet', min vi karesu.

En vepret' dom' vilaĝfina,
ne elŝovas sin orgojle,
sed l' anĝel' post teren-flug' jen
vespermanĝas niasojle.

S. W.

Károly Tamkó-Sirató kaj Sándor Weörös

LA DU TOMOJ

Eta Tom',
granda Tom',

fam' pri ili
nur iom.

Venis kurba
ŝip' sen sono,
ili ŝipis
al mar-fono,
kaj en fora
ter' vapora
jen sin kaŝis
en kokono,
fam' ne plias
eĉ iom.

Granda Tom',
eta Tom',
restis diri
neniom.

K.T-S

RESTIGADO

En okuloj
vi la sunon
ho, ne portu for!
Se vi irus,
ĉio grizus
ronde sen kolor'.

Branĉ' ne lulus,
bird' ne flugus,
ĉesus plug-labor'.
En okuloj
vi la sunon
ho, ne portu for!

S. W.

MALFRUA AŬTUNO

La arbaron mi trapasis . . .
– Kaj ĉu poste?
Rozarbeton mi surpaŝis . . .
– Kaj ĉu poste?
Ekkrietis la rozujo . . .
– Kaj ĉu poste?
Kaŝis sin ĉiel-lazuro . . .
– Kaj ĉu poste?
Vi malvarmos ĉe la dorso . . .
– Kaj ĉu poste?
Prenu pelton de la urso . . .
– Kaj ĉu poste?
Vi bonfartos eĉ dumfroste!

K.T-S

ĜARDENETON

Ĝardeneton baris mi,
fosaĵeton faris mi,
penon ne avaris mi.

Kreskis rap', rafan' po mil,
pompas ŝel' je ruĝa bril':
jen la freŝa beligil'!

K.T-S



Grafikaĵo de Margit *Artner*



Ferenc Móra

Verkinto de tiu ĉi novelo naskiĝis la 17-an de julio 1879 en Kiskunfélegyháza, do antaŭ cent jaroj. Lia patro estis malriĉiginta peltisto, kiu kun sia familio vivis en terura mizero. Tamen aŭ ĝuste tial li estis gardanto de progresemaj tradicioj de la revolucio de 1848. La patro sukcesis instruigi siajn filojn (ankaŭ 15 jarojn pli aĝa frato de Ferenc Móra estis verkisto).

Post la studado en la Budapeŝta Universitato Móra iom da tempo instruis infanojn, sed poste li dediĉis sin al gazetara verkado. En 1904 li fariĝis vicbibliotekestro en urbo Szeged, kaj dume li plu laboris por la ĵurnalo *Szegedi Napló* kaj infangazeto *Az Én Újságom* (Mia Gazeto), kie inter 1905 kaj 1922 aperis pli ol mil Móra-verkoj. tiel okazis, ke Móra ĝis nun estas konata precipe kiel porjunulara verkisto. Sed ankaŭ kiel radikala publicisto li estis unu el la plej elstaraj. Pro tio li, kiel ĉefredaktoro de Szegedi Napló, en 1913 estis akuzita pro majest-ofendo. En 1918 post la burĝa-demokratia revolucio Ferenc Móra verkis plurajn artikolojn, en kiuj li postulis de la respublika registaro veran demokratecon. En 1919 li entuziasme salutis la Konsilian Respublikon. Pro tio poste la blankteroristoj volis lin ekzekuti, sed literaturamanta ĉefpolicestro de Szeged savis la verkiston. Kvankam post 1919 Ferenc Móra revenis al pozicioj de burĝa radikalismo, li protestis kontraŭ la anatemo kontraŭproletara. En la dudekaj jaroj Móra estis akuzita pro „naci-ofendo", ĉar laŭ li la registaro respondecis pri eventoj de la blanka teroro.

Ferenc Móra verkis precipe novelojn, sed ankaŭ liaj brilstilaj porjunularaj kaj aliaj romanoj estas tre sukcesaj, kiel ekzemple la *Trezorserĉa pelteto* kun multaj aŭtobiografiaj eroj, politika satiro *Revivigo de Hanibalo, Kanto pri Tritikkamparo* kaj la *Ora ĉerko*, en kiu li kun granda talento montras epokon de la Romia imperiestro Diocletianus.

En la verkado de la laste menciita romano la aŭtoron multe helpis lia arkeologia-historiista laboro. Ferenc Móra ja ekde la jaro 1917 estis direktoro de la urba muzeo de Szeged, kiu hodiaŭ havas lian nomon. Kiel tiu li estas unu el la plej elstaraj personoj ankaŭ de la hungara arkeologio. Li mortis en 1934.

Bela arbo de Kristnasko...

Mi aĝis ok jarojn, vizitis la trian klason de la elementa lernejo, kaj la unuan fojon paŝis al la scenejo de la publika rolado. En nia urbo komenciĝis moŝta modo: oni starigis Kristnaskan arbon en la sanktejo apud la altaro, kaj estis serĉata iu konvena ĉifonuleto por saluti la ĉielan abion. Nu, malriĉan infanon ankaŭ tiam Kiskunfélegyháza ne bezonis pruntepreni de Szeged, la lokuloj havis ja sufiĉe da tiu riĉo. Sed laŭ la Biblia parabolo multaj estis vokitaj, sed malmultaj estis elekteblaj. Unu el ili lispis, la alia estis konsiderata tro adoleska, la trian estis eble starigi sub la Kristnaskan arbon nur kun helpanto. Nome kun tia persono, kiu devis ordigi lian nazeton, kio tamen ne estas kutima en tia festa okazo. Ĉe la plejmulto la plej granda problemo estis, ke pro la timo ilia parolo haltis, kio ankaŭ kun lipharhavaj oratoroj okazadas, sed tiuj ne ekploras tiam, sed helpas sin per tusado. Finfine la komuna konfido turniĝis al mi. Mi estis opiniata sufiĉe ĉifona, mi havis palan vizaĝeton kaj sovaĝe nigran haraaron, kiu ne toleris la kombilon, kaj mia voĉo sonoris kiel tiu de moŝta fraŭlino.

– Kaj ĉu vi ne timos, knabeto? – levis mian mentonon iu el la instruistaj moŝtoj.

– Mi nenion timas, nur la hundojn – diris mi memrespekte – kaj la ĝardengardistojn – aldonis iom mallaŭte.

Mi estis trankviligita, ke tiujn oni ne lasos en la preĝejon, kaj mi ricevis salutpoemon verkitan de sinjoro instruisto Fehér, Dio lin absolvu, la forpasintan. Ĝi estis bela, longa poemo, kies du unuajn versojn eĉ tiam mi povos diri parkere, se mi renkontiĝos kun la instruista moŝto supre, en la granda ekzameno.

Bela arbo de Kristnasko
Venis vi el kiu land'?

Ĉio iris laŭ la programo, eĉ la vetero kondutis regule. Matene de la Kristnaska fasto la borderon de nia tegmento ornamis tiom grandaj glacipendaĵoj, ke mi povis derompi ilian pinton per mia suprenĵetita ĉapo. Neniam de tiu tempo mi sukcadis tiom bongustajn objektojn en la rilato de glacipendaĵoj. Ĝi havis guston de la putranta ŝindo, kaj tion neniu sukeraĵisto kapablas produkti. Krom tio, ke ĝi trejnis la gorĝon, ĝi gutigis en min grandan memfidon. Mi varme tion rekomendas al komencantaj oratoroj, la glacipendaĵ-sukcado forigas ĉian podian tremon.

Mi ne rimarkis, ke mi malvarmus, ĉar mia povra kara patrino donis sur min sian kaptukegon, farante nodon dorsflanke. Miaj okuloj larmis nur, ĉar la nazon kaj la mentonon mordadis la frosto. Sed tion neniu rimarkis, ĉar vintre ĉiuj honestaj nazoj ruĝas. Ili ruĝis ankaŭ ĉe la geinstruistoj, kiuj atendis min piedfrapante apud la lernej-angulo. Tute pro alio haltis sur mi la benita vido de la fraŭlina moŝto Berta Honthy.

– Mi timas – ŝi ekridetis, rimarkinte min –, ke tiu ĉi infaneto iom troigas la ĉifonecon. Oni tamen devus vesti lin per ia mantelo. Ĉiu pravigis ŝin, sed de kie preni superfluan mantelon? La plano estis, ke sinjoro inst-

ruisto Szente alportos min al la butiko de la vendisto Stross, kaj oni tie vestos min je la nomo de Jesuo, sed tion unue mi devis perlabori per la deklamado. Feliĉe, preteriris nin la lernejpordisto surhavanta solenan mantelon kun karakula kolumo. Li estis tre moroza, maljuna viro, sed nun la ĉielaj suproj orumis lian animon.

– Mi donus al la knabeto mian pelteton – li diris iom malrapide kvazaŭ mirante pri si.

– Nu, tion rekompencos al vi Dio, oĉjo Karlo – ĝojkriis fraŭlino Berta, kaj tuj komencis malbutonumi la pelteton sur la bona homo.

– Oj, pardonon, mi pensis ne pri tiu – desaltis time la maljunulo –, sed pri la ĉiutaga. Tuj mi ĝin alportos.

Oni ne povas diri, ke li ne faris tion, ĉar li fakte alportis la ĉiutagan. Tiun, en kiu li kutime balais, hejtis, purigis la kerosenajn lampojn. Oni donis ĝin sur min, ĝi verŝajne bone sidis sur mi, ĉar ĉiu ridis al mi, ekvidinte min. Ĝi fakte kovris tutan mian ĉifonecon, sube videblis el ĝi nur pintoj de miaj botetoj, miaj manoj tute ne estis videblaj, ĉar la brakoj atingis nur ĝis la kubutoj de la manikoj. Mi memoras ankaŭ tion, ke la unua moŝta vestaĵo, portita de mi havis tre fajnan kerosen-odoron, tute diferencan disde la odoro de la hejma kerosено.

Mi neniam forgesos ankaŭ la plenŝtopitan preĝejon, en kiu ni pene povis trovi vojon: en la unuaj vicoj la moŝta societo, poste la popolo en peltoj, peltjakoj, la maljunulinoj en nigraj kaptukegoj, la odoro de vakskandeloj, miksata kun tiu de Kristnaska matenmanĝo, ajlo kun mielo. Ĉio estis tiom granda kaj mi tiom eta! Jes, tion rimarkis ankaŭ sinjoro instruisto Osza dum ni sukcesis batale atingi la sanktejon, kaj li esprimis la problemon turnante sin al lia pastra moŝto Agócs:

– Oni devus starigi ĉi tiun Fingruleton sur seĝo, ĉar alie li tute perdiĝos!

Estis vokata la sonoregisto, sed li respondis per ŝultrolevo. Iu mortos, se li provos trairi la amason kun seĝo!

Oni devas starigi la infanon sur la ŝtonbenko! – iu diris, kaj li tuj ĉirkaŭbrakumis kaj starigis min sur la marmora barilo, dividanta la sanktejon disde la navo. Tuj mi fariĝis je unu kapo pli alta ol ĉiuj' – ho neniam mi estos tiom granda, kiel tiam en la antikva preĝejo de Kiskunfélegyháza. Mia kapo estis en la sama nivelo kiel tiu de la ruĝvesta Marinjo, kiu loĝis en sia vitrodomo sur la plej malhela altaro, ŝia varma rideto tamen atingis min, ŝi tamen ekkaresis permane mian koron, tiom maltrankvile batantan en la kapturniga alto, kaj ŝi ekde tiam tenas la manon tie en la penaj horoj, kaj mi scias, ke ŝi ne deprenas ĝin de tie ĝis miaj morthoroj.

Mi longe, tre longe staris tie, ĉar oni devis atendi ĝis la sinjoro urbestro alvenis, ekbruligi la Kristnaskajn kandeletojn same estis malfacile, ĉar la sonoregisto Fekete neniam faris tion ankoraŭ, kaj li murmuris dume tiajn preĝojn, kiujn eble la keruboj ne konsideris tro decaj, kaj mi komencis endormiĝe torpori sur la marmorbenko. Sed finfine sur ĉiu kandelo ekfloris la flamo, kaj sinjoro instruisto Fekete ektiris sur mi la moŝtan mantelon:

– Nur kuraĝe, Feriĉjo!

Sed kial mi ne estintus kuraĝa? Mia voĉo sonoris super la homkapoj, kiel tiu de la anĝeloj super la Betlehemaj kamparoj.

Bela arbo de Kristnasko,
Venis vi el kiu land'?

Laŭ la instrukcioj ĉi tie mi etendis la brakojn, kaj la longaj manikoj faris tiom grandan flugon, kvazaŭ mi ekhavis verajn flugilojn. Tio estis tiom granda ĝojo por mi, ke post ĉiu strofo mi ekflugis, ĉu estis bezone, ĉu ne. Mi mangestadis sufiĉe por tuta mia vivo, sed tiom sukcesigis la poezion de la sinjoro instruisto, ke eĉ ĉefanĝelo Mikaelo lasis iom la satantretadon sur flanko de la katedro, kaj salutis min per sia flamglavo.

– Bravulo vi estas, Feriĉjo – anoncis sinjoro instruisto Szente alvenon de tiu momento, kiam la oratoro estas salutata de ĉiu ebla flanko. – Nun vi povas reveni, donu al mi la manon!

Nature, ke mi povis doni nur la manikon, en kies supra regiono troviĝis la mano, tamen ne la manoj faris problemon, sed la piedoj. Ili ne volis moviĝi, kvazaŭ ili estis enradikiĝintaj la ŝtonon.

– Venu do, ĉu vi ne aŭdas? – ektiris la sinjoro instruisto la manikon. – La Sinjora Moŝto volas vin ekkaresi.

En la tuta urbo estis unu sola Sinjora Moŝto, la deputito, kiu tiam estis Lajos Holló. Lia neforgeseble bela vireska vizaĝo jam ridetis sub mi. Li brakumis miajn genuojn, kaj lia voĉo jam karesis:

– Venu, amiketo, mi vin deprenos.

– Ne . . . la piedoj ne lasas min – mi balbutis per buŝo, kurbiĝanta ploreti. Mi ektimis, ĉar mi sentis vere, ke miaj piedoj alkreskis la ŝtonon.

– Ĉu? Ĉu la piedoj ne lasas? - ridis Holló, kaj forte tiris min al si.

Unu el miaj piedoj liberiĝis, sed samtempe mi ekveis tre forte:

– Oj, oj, oj, ne turmentu min!

La ridetanta vizaĝo kliniĝis al mia piedo kaj – de fraŭlino Berta mi aŭdis poste – sensange leviĝis.

– Granda Dio, la piedoj de ĉi tiu infaneto frostiĝis al la ŝtono!

La alian piedon oni jam gardeme degeligis, ĉar ĝi eĉ pli amikiĝis kun la marmoro. La skrapado evidentigis, ke mi paŝis al la scenejo de publika rolado en senplanda boteto, kaj tial mi ne povis foriri de tie. La tuta glacio, neĝo, kiujn mi kolektis dumvoje, dum mia starado unue degelis sub miaj varmaj plandoj, poste frostiĝis, kaj gluis min al la ŝtono.

– Ne gravas, ĝi estos flikita el la propra materialo–premadis miajn piedojn doktoro Sor, kiam mi kuŝis kun kunpremitaj lipoj sur la genuoj de nia deputito. Sinjoro doktoro sciis, ke mi estas filo de la panbakanta virino, ĉar mi portis al ili ĉiumerkrede la panon, tiom varman, kiel oni prenis ĝin el la bakforno, kaj krom tio li konis mian specon, ĉar la malgranda kalvulo estis kuracisto de la malriĉuloj. Tamen li diris, ke estus bone sendi por Deskó, kaleŝisto de la urbo.

Tiel mi sidis la unuan fojon en eleganta kaleŝo, kiu nur malrapide povis iri en amaso de la peltuloj kaj nigrakaptukaj virinoj, kiuj ankaŭ tiam meditis pri ŝanĝemo de la mondaj aferoj. Multaj eĉ tiam viŝadis la okulojn pro la kortuŝiteco, kaj laŭdis la belan eltrovon moŝtan. Precipe tion faris virinoj, sed kelkaj maljunaj onjoj malkontente skuis la kapojn, ke la moŝtoj eĉ el la preĝejo faras panoramon kaj aranĝas deklamadon antaŭ la altaro.

– Nia fileto tiu estis, bofratino – provis protekti miaj gepatroj la moŝtojn, kiam ili trovis konatojn en iu aŭ alia babilanta societo. Sed poste ili rezignis informi la homojn, ĉar tiuj aŭ priridis ilin, aŭ embarasite murmuris, ke, kio povis okazi kun bofrato Márton en tiu ĉi sankta tago? Kial ĝuste ilian filon protektus la moŝtoj okaze de la benita naskiĝo de nia Sinjoro Jesuo Kristo? Tre blankvizaĝa estis la predikinta junulo, eĉ laŭ lia voĉo sentiĝis, ke li hejme estas nutrata permigdale, tiu verŝajne estis moŝta knabo el elita familio, sed povis esti eĉ moŝta fraŭlino, ĉar ŝi multe turnadis sin tien-reen.

Kaj mi nenion spertis el la reĝa gloro, kun kiu mi eniris en la straton Daru, mi nur sentis, ke fajrero varmegas sur miaj ĵus senhaŭtigitaj plandoj. Kaj tiam vekiĝis en mia senluma cerbeto, la penso ke ekzistas vintra Dio, alia ol tiu, kiu ridetas somere.

Tradukis: Péter András *Rados*

Dum gaja ludado, babilante, promenante estas prezentataj valorajoj de la Belarta Muzeo al infanoj de infangardenoj kaj bazlernejoj. Trifoje, ĉiusemajne oni atendas la infanojn ankaŭ en la metiejoj por ili ekipitaj. Tie fakspertaj instruistoj helpas al ili ekkoni la bonan guston de la krea laboro.

Infandesegnajoj

Kio logas en la animo de la infanoj? Kiu kaj kio povas formi fruktodone la karakteron, idealojn de la malgrandaj homoj? Ĉi tiuj demandoj estas ĉiutagaj, kaj la gustajn respondojn serĉas gepatroj kaj pedagogoj, kuracistoj kaj psikologoj, artistoj kaj arthistoriistoj.

Estas multaj, kiuj asertas, ke ni povas trovi la plej bonajn deĉifrojn en la infandesegnajoj. Eble ni povas danki al tiu ĉi rekono, ke en la lastaj jardekoj oni arangas ne nur lernejajn, urbajn, sed ankaŭ landajn kaj internaciajn ekspoziciojn de infandesegnajoj. Kelkaj tiaj internaciaj arangoj – ekzemple la japanaj kaj hindaj – estas mondfamaj, kaj inter la premiitaj partoprenantoj de tiuj ekspozicioj ĉiam troviĝas ankaŭ hungaraj infanoj.

Kio estas videbla sur ĉi tiuj desegnajoj? La infanoj mem kaj la gepatroj, kompreneble sen ĉia kosmetiko. Tute sincere, kiel la infanoj konas la mondon de la plenkreskuloj. Patrino karesas sian bebon, grupo de infanoj ludas sinforgese, sed aperas ankaŭ alkoholista patro, batanta siajn infanojn, aŭ murdisto, mortpafanta la viktimon – ĉi lasta evidente respegulas „televidajn spertojn". Okazas ankaŭ, ke la infanoj anstataŭ la vera vivo kreas en siaj desegnajoj alian revmondon. Por psikologoj ĉi tiuj verke-



infananimoj

toj malkovras fakte ĉion ankaŭ sen vortoj, kaj foje-foje infandesegnaĵoj estas ekskuaj travivaĵoj ankaŭ por artistoj kaj kritikistoj, ĉar ili prezentas nekonatajn novaĵojn el la profundo de la animo.

Infanoj ŝatas desegni, pentri, fari skulptaĵetojn, gravuraĵojn ktp., *se* kompetenta instruisto gvidas ilin. Kaj la utilo de tiu ĉi laborado estas tre grava, multflanka. Ili ekkonas diversajn materialojn, rimedojn, ilojn, ili lernas vidspertadon, vidkulturon.

Geyza *Deák* (1871–1931), hungara profesoro en la altlernejo de Sárospatak, verkis libron en 1910, en kiu li skribis: *„... post la legado kaj skribado la plej grava estas la desegnado."* Lia koncepto por la evoluigo de la vidkultura edukado estis simila al tiu, kiun poste sukcese realigis sur la tereno de la muziko Zoltán *Kodály*.

Ĉu estas artistoj la infanoj, kiuj desegnas, pentras belajn, eble premiitajn bildojn? Ne, sed tamen estas pensiga tio, kion citas Mária *Sz. Vida* en sia libro (Infanarto en Japanio, Budapeŝto, 1971). Japana instruisto diris foje al siaj lernantoj: *„Ne pensu, ke vi estas grandaj artistoj, tamen efektive vi ĉiuj povas esti iasence artistoj."* Jes: *nur* necesas plenkreskuloj, gepatroj, kaj pedagogoj, kiuj scias ekflorigi la dormetantajn kapablon, talenton.

Foto: Dezső *Tanka*

Mi opinias, ke la Internacia Jaro de la Infano donas bonan okazon prezenti kelkajn infanajn verketojn. Ne forgesu, ke ankaŭ ni estis infanoj, kaj la nuntempaj knaboj kaj knabinoj iam estos plenkreskuloj. Helpu do ilin, ke ili povu esti iomete pli sinceraj, veraj, puraj, ol estas ni, iliaj gepatroj.

Mihály *Gergely*

Fine de la 17-a jarcento, okazis ribeloj de

Ĉapitroj el la historio

Zoltán Halász

10. Batalo de »kuruc«-oj por la sendependeco

Imre Thököly, estro de „kuruc"-oj en la kontraŭ-Habsburgaj bataloj

Ilona Zrínyi, patrino de Rákóczi

Fine de la 17-a jarcento, pro la subpremo kaj mizero, larĝaj tavoloj de la loĝantaro sin turnis kontraŭ la regado de Habsburgoj. Parto de la nobelaro, fuĝanta de l' teroro, trovis refuĝejon en Transilvanio. La hungaraj soldatoj, militservintaj en la ĉelandlimaj fortikaĵoj, estis maldungitaj, ilian lokon okupis eksterlandaj solduloj. Restintaj sen pano, ili eniris servadon de la nobeloj malamikaj al Habsburgoj. La senesperiĝintaj servutuloj simpatiis kun tiuj soldatoj, kiuj sin nomis „kuruc"-oj.

En 1676 juna bienulo, Imre Thököly, fariĝis estro de la ribelo. Pere de financa apogo de la franca reĝo Ludoviko la 14-a kaj la helpo de turkoj, li organizis potencan armeon. Gvidante sukcesajn militkampanjojn, Thököly okupis la nordorientan regionon de Hungario. La fideluloj elektis lin suvereno de la lando. La registaro de Habsburgoj, kiuj tiutempe militadis kontraŭ Francio, devis cedi. La tutlanda asembleo, kunvokita en 1681, restaŭris la sistemon de l' Ordenoj, proklamis amnestion kaj faris koncedojn rilate la liberan religian kulton. Tiam multaj nobeloj, favorantaj akordon kun la Habsburgoj, forlasis Thököly-n, kiu, elmigrinta, mortis en Turkio.

Dume, la rilatoj inter Habsburgoj kaj turkoj esence aliiĝis. Grandveziro Kara Mustafa en 1683 eksieĝis Vienon, kaj la imperia ĉefurbo liberiĝis de la du monatojn daŭranta sieĝo nur dank' al la armeo sendita de la pola reĝo, Johano Sobieski. Inter la Imperio de Habsburgoj, Pollando kaj Venecio kreiĝis Sankta Ligo kontraŭ la tiutempe jam malfortiĝintaj turkoj. Somere de 1686, post sangaj bataloj, la armeo de l' alianco okupis la urbon Buda, kaj de tiam, paŝo post paŝo, ĝi estis forpelanta la turkojn el Hungario. En la liberigaj bataloj, plimulto de la „kuruc"-oj eniris servadon de la imperia armeo.

Post la venko, la registaro de Habsburgoj ankaŭ en Hungario enkondukis reĝan absolutismon. Al multaj grandbienuloj ne estis redonitaj tiuj bienoj, kiuj troviĝis en teritorioj reakiritaj de la turkoj. La kampuloj, siavice, elportis grandajn ŝarĝojn, ĉar ili estis devigataj gastigi la imperiajn soldulojn oficantajn en Hungario. Kaj fine, la burĝaro pagis grandegajn sumojn kiel imposton.

Komence de la absolutisma periodo, la malkontento okazigis sporadajn ribelojn. Fine, post iom da tempo, Tamás Esze – servutulo en la Rákóczi-bienoj, norda Hungario – kaj Albert Kis – eksoficiro en la Thökölyarmeo – organizis movadon, kaj en 1703 ili petis la junan Ferenc Rákóczi la 2-an, ke li entreprenu la estradon de la ribelo.

Rákóczi (1676–1735) estis la plej granda bienulo en la lando. Lia patro estis elektita princo de Transilvanio, dume lia duonpatro, Imre Thököly, kiel ni vidis, estis estro de la ribelo de „kuruc"-oj. La patrino, Ilona Zrínyi, post heroa defendado de la fortikaĵo de Munkács* kontraŭ sieĝo de la Habsburgaj trupoj, elmigris kune kun sia edzo en Turkion.

La batalo de Rákóczi por la sendependeco (1703–1711) rapide populariĝis, kaj fariĝis tutlanda movado. Por garantii apogon de la kampularo, Rákóczi promesis al ili definitivan liberigon el ilia dependa stato de la grandsinjoroj, se ili eniras servadon de la ribelanta armeo; krome, dum daŭras la bataladoj, la familianoj de la servutuloj ne bezonas fari la kutimajn servojn al siaj sinjoroj. Alie, por ke li gajnu por si la nobelaron, tiujn kampulojn, kiuj ne servadas en la armeo, li devigis plenumi la taskojn de servutuloj. La Rákóczi-armeo, kiu komence konsistis nur el plenmano da soldatoj, baldaŭ fariĝis 70 mil-, kaj iom poste 100 mil-membra. En 1705, kiam Rákóczi kunvokis la tutlandan asembleon, granda parto de Hungario troviĝis jam en manoj de la „kuruc"-oj. La asembleo elektis Rákóczi-n suvereno de la lando, kaj du jarojn poste,

*Nun Munkačevo en Sovetio.

de la hungara popolo **

Ferenc Rákóczi la 2-a

La Rákóczi-standardo

Portreto de Ferenc Rákóczi la II-a

Monumento al Ferenc Rákóczi la 2-a en Budapeŝto, sur la placo Kossuth

Manifesto de Rákóczi por la kristanaro



A' MELTOSAGOS FEJEDELEM
FELSÖ-VADASZI
RAKOCZI FERENCZ,
Kegyelmes Urunk általt:
Nemzetünknek s' édes Hazánknak a' Német Nemzet kegyetlen Uralkodása alatt lett, hallatlan meg-nyomorittatásárúl, maga Meltóságos Személlyének nagy méltatlan szenvedésérûl,
Es
Az Auſtriai Ház erőltzakoskodása alól való fel-ſzabadulásért fogott Magyar fegyvernek ártatlanságárúl, az egéſz Kereſztyén Világnak
eleibe adatott
MANIFESTUM.
KÖZ TUDOMANY TETEL.
Melly elsöben Deák, moſtan pedig Magyar Nyelven, újonnan közönségeſé tétetett.
Nyomt. 1704. Eſztend.

en 1707, la sekva asembleo proklamis la detronigon de la Habsburga dinastio, kaj la sendependecon de Hungario.

Sed dume, multaj nobeloj rezignis daŭrigi la batalon por la sendependeco, ĉar ĝi postulis grandajn materiajn oferojn. Interne de la armeo ekestis malkontento pro nepago de soldoj, kaj la senpaciencon grandigis ankaŭ tio, ke ne efektiviĝis la promesita liberigo de la servutuloj.

En tia malfacila situacio, Rákóczi klopodis akiri helpon de Ruslando, konfederinte kun caro Petro la 1-a (La Granda); poste, en 1708, li invitis la heredanton de la trono de Prusio por okupi tiun de Hungario. Samjare li editis la dekreton – jam tre atendatan – pri la liberigo de la servutuloj. Sed tiuj aranĝoj malfruiĝis: la imperiaj trupoj en sanga batalo venkis kontraŭ la Rákóczi-armeo. Ĉiam pli da nobeloj transiris en servon de Habsburgoj, sekve, iliaj subuloj estis subpremitaj. Prenante la lastan eblaĵon, Rákóczi sin turnis al caro Petro la 1-a por peti helpon. En lia foresto Sándor Károlyi, estro de la „kuruc"-trupoj demetis la armilojn kaj subskribis la packontrakton de Szathmár kun la Habsburgoj (1711).

Rákóczi ne akceptis la amnestion proponitan: unue li elmigris en Francion kaj poste en Turkion, kie li vivis ĝis sia morto.

En 1976, festante la trijarcentan datrevenon de l' naskiĝo de Rákóczi, la hungara popolo respektplene primemoris ĉi tiun heroon de l' sendependeco, kies pensoj, kolektitaj en la „Memuaro" kaj „Konfesoj", restis por la posteularo.

Omaĝis al la jubileo ankaŭ *Hungara Vivo* per la numero 1976/5.

Tradukis: VHZS

* Jarcentoj de la hungara literaturo *

István Torda

Bálint Balassi

La reformacio radikale transformis la kulturon de la hungara socio. Tiu ĉi procezo havis ankaŭ detruajn konsekvencojn (kiel ekzemple malrapidiĝo de profana kulturo renesanca), sed pli grava ol tiuj estis, kion ĝi konstruis. Tiu religi-socia movado helpis ĝeneralan leviĝon de la nivelo de edukiteco, ĝi definitive establis praktikadon de la libropresado.

Biblio kaj la Diablaj tentadoj

La instruojn de reformacio la ĉefaj reformacianoj hungaraj mem konceptis en siaj verkoj. Krom verkado de tiuj manlibroj ili dekomence insistis pri tradukado kaj presado de la tuta Biblio. Tamen forpasis pli ol duonjarcento ĝis tiu ĉi plano realiĝis. La Biblio, tradukita de *Gáspár Károli,* forlasis la presejon en 1590. Tiu ĉi traduko fariĝis Hungarlande modelo de la Bibliaj lingvaĵo kaj stilo. La teksto de Károli denove kaj denove estis represata (kvankam multfoje tralaborita), ĝi havis pli ol cent eldonojn. La hungaraj protestantaj eklezioj uzis kaj parte uzas ĝin ankaŭ nun. Nur en la jaro 1977 ili eldonis novan Biblio-tradukon.

Antaŭparolo de Hungara traduko de la Nova Testamento fare de János Sylvester 1541


AZ MAGYAR NIPNEK EZ ELEZT
OLVASSA

La plej populara kaj plej varia artospeco de la reformacio estis la t.n. „kanto". Inter la kantverkistoj la plej talenta estis la morne-pasia *András Szkhárosi-Horváth.* En siaj versaĵoj li kun morda ironio atakas ĉefe la Rom-katolikan Eklezion kaj ĝiajn pastrojn.

La epikan prozon de la reformacio reprezentas du grandsignifaj verkistoj. Nome *Gáspár Heltai* kaj *Péter Bornemissza.* La fama *Cent fabloj* de la unua estas bonstila, libera tralaboro de la Ezopaj fabloj. Bornemissza verkis predikarojn, kies moral-ekzemploj estas skizoj pri fenomenoj de la tiutempa socio. La vivo de aristokratoj, nobeloj, pastroj, kampuloj, urbanoj montriĝas kun ŝoka aperteco en rakontitaj historioj, priskriboj kaj kelkaj tipoj, kiujn li faras vivaj kun mirinda lerto. Bornemissza en la verko *Diablaj tentadoj,* kiu estas suplemento al unu el liaj predikvolumoj, kun eksterordinara energio agitas kontraŭ la aristokrataro, laŭnome vicigante ĝiajn anojn kune kun iliaj kulpoj. Li estis enprizonigita pro sia aŭdaco.

Adepto de Mars kaj Pallas

La renesanca liriko hungara ĝis la mezo de la 16-a jarcento fortiĝis kaj iĝis tiom populara, ke ĝi bezonis nur grandan poeton, povantan sumi kaj plukonstrui la rezultojn ĝis tiam atingitajn. *Bálint Balassi* (1554–1594) estas la fondinto kaj la unua koloso de vere granda hungarlingva liriko.

Lia patro János Balassi estis riĉega aristokrato kaj brava militisto, kiu zorgis pri altnivela edukado de sia filo. Instruisto de Bálint ekde 1564 estis Péter Bornemissza. Kiam en 1569 la patro estis arestita laŭ la akuzo pri kontraŭrega komploto, la familio rifuĝis al Pollando. Ilin sekvis ankaŭ la familiestro, eskapinta el la kaptiteco. Li poste pruvis sian senkulpecon, kaj en 1572 regajnis la reĝan gracon. Produkto de tiuj mallumaj jaroj estas la unua konata junaĝa verko de Balassi: *Kuracherba ĝardeneto por malsanaj animoj.* Ĝi estis religia meditado tradukita el la germana. La libro aperis eĉ presite en Krakovo. Tiu ĉi frua „dokta" traduko atestas pri alta instruiteco de la aŭtoro.

En la sama jaro, kiam aperis tiu ĉi libro, Bálint vokis al si atenton dum la kronadaj festoj en la urbo Pozsony (nuntempe Bratislava en Slovakio). Historiisto Miklós Istvánfi ĉeestis, kaj tiel rakontis pri tio en sia latinlingva verko *Historia Regni Hungariae* (Historio de la Hungara Reĝlando): „Valenteno Balassi 22 (fakte nur 18-red.) jara filo de Johano, antaŭ nelonge reprenita al la reĝa favoro, gajnis la palmon en danco-speco, kiun ni konas originala kaj aparta danco de niaj ŝafistoj . . ."

János Balassi laŭ la volo de la Viena imperiestra-reĝa kortego subtenis milit-entreprenon kontraŭ la duko de Transilvanio, Stefano Báthori. La malgranda taĉmento estis frakasita jam ĉe la landlimo, sed la kaptitan Bálint, perklabe vunditan la duko konsideris amiko. Post la resaniĝo li fartis bone en la duka kortego italece erudita. Kiam Báthori estis elektita reĝo, de Pollando li prenis kun si la poteon, kiu inter la polaj korteganinoj vivis kiel kuko en la butero. Eble li ĉi tie ekkonis la italajn dancojn al kies melodio li verkis plurajn versaĵojn. (Ĉiu lia poemo laŭ la tiutempa kutimo estis kantable laŭ la melodio de modaj kantoj. – Red.) En 1577 li iris militi al Gdansko, sed ricevinte sciigon pri la morto de sia patro, li iris hejmen. En Hungario li partoprenis kontraŭturkajn t.n. limfortikaĵajn batalojn, krome daŭrigis procesadojn de la patro kontraŭ la najbaraj grandsinjoroj.

En 1578 li konkeris la amon de *Anna Losonczi,* edzino de la Eger-a fortikaĵestro Kristóf Ungnád. De 1579 ĝis 1582 li servis kiel husar-leŭtenanto en Eger. Pro ia konflikto li forlasis Eger-on kaj reiris al sia naskiĝurbo Zólyom (hodiaŭ Zvolen en Slovakio). En Kristnasko de 1585 li edziĝis al sia kuzino Krisztina Dobó. Lia

Bálint Balassi

Bálint Balassi (1554–1594):

Renkontinte Julian, jene ŝin salutis

Mondo estas sen valoro
Sen vi, mia bela floro,
Jen vi staras nun ĉe l' koro
Sane, brile, ho trezoro.

Ho, vi ĝoj' de l' kor' ĉagrena,
Vi, sopiro dolĉoplena,
Vi, feliĉo plej serena,
Sur vi Dia mano bena.

Brila orpalaco mia,
Bonodora flor' lilia,
Rozo ruĝa, rozo dia,
Vivu longe, ho, Julia.

Brilu, mia suno hela,
Brovo nigra, ark' fabela,
Okulparo mia stela,
Vivu, viv-espero bela.

Ame flamas mia sino,
Vin sopiras mi sen fino.
Mia amo kaj animo!
Vin salutas mi, Reĝino!

Renkontante ŝin mi petis,
Sur genuojn mi min ĵetis,
Komplimenton jene metis,
Kaj ŝi bele ekridetis.

Tradukis: K. Kalocsay

edzino konsideris la fortikaĵon de Sárospatak sia havaĵo. Por rekonkeri ĝin, Bálint Balassi provis okupi la fortikaĵon, sed la gardistaro forpelis lin kaj liajn armitajn homojn. Bofrato de Balassi, Ferenc Dobó akuzis lin pri atako kontraŭ reĝa fortikaĵo kaj ankaŭ pri incesto pro la edziĝo al sia kuzino. La poeto, timanta malfavoran juĝon, malmultekoste vendis ĉiun havaĵon al sia onklo, kaj preparis sin por eskapi al Transilvanio. Intertempe li ricevis reĝan pardonon, sed kun la aprobo de Ferenc Dobó tamen li eksedziĝis, ĉar li eksciis pri trompo far Krisztina.

La poeto per amaso da leteroj kaj versaĵoj sturmis la riĉan Anna Losonczi, intertempe vidviniĝintan. En poemoj li nomas ŝin Júlia. Sed si eĉ ne jam priatentis lin. Poste Balassi iris de unu loko al la alia. En tiu ĉi tempo li verkis la plej belajn pecojn de la Júliaciklo. Li iris al Pollando por batali kontraŭ la turkoj. Sed la milito ne okazis. Li verkis perfektajn poemojn en Debno kaj en Krakovo, kie Anna Szárkándi, edzino de Ferenc Wesselényi havis domon. En ili li amindumis al ĉi tiu Anna, kiun li nomas en la poemoj *Coelia.* En 1591 li revenis al Hungario. Li tie ĉi amindumis al nekonata damo, nomata en liaj poemoj *Fulvia.* Li senrezulte procesis kun la onklo por siaj bienoj. Kiel la lasta helpo venis al li la „longa milito", komencita somere de 1593. En novembro li okupis iaman fortikaĵon de sia patro en Divin. Kaj printempe de la sekva jaro li ĉeestis la sturmon de Esztergom. La 19-an de majo – kiel skribas pri tio Istvánfi, eterniginta siatempe lian ŝafist-dancon-„ambaŭ femurojn de la entuziasma sinjoro Valenteno Balassi estinta adepto kaj de Mars kaj de Pallas (antikvaj gedioj dè milito kaj de scienco – red.), trairis plumbkuglo, pro kiu vundo, kvankam la kuglo ne tuŝis oston, li post kelkaj tagoj mortis."

Poeto de la amo

La poeto vivis apenaŭ kvardek jarojn. Dum kvar jardekoj li spertis densigite la tuton de la homa vivo. Li trairis ĝiajn ĉielon, purgatorion, inferon. Ne trovis li sian lokon en la feŭda mondo. Unuflanke li senbridadis kiel spirito de la arkaika pasinto, aliflanke li metis antaŭ sin tiajn celojn, kies sencon liaj samtempanoj eĉ ne konjektis. Ŝlosilon de pli bela vivo li vidis en la amo. Li fariĝis granda poeto, verkante ampoemojn. Sub la preteksto de la amo li povis plej multe esprimi el sia epoko. Ankaŭ liaj religiemaj versaĵoj estas dependaĵoj de lia amliriko, ankaŭ lia milit-tema poezio elkreskis el la amtema.

Ampoemojn Balassi verkis en la unua tempo nur por amindumi, poste ili fariĝis komentoj al lia vivo. Kiam li volis denove konkeri sian iaman amatinon Anna-Júlia-n, li verkis laŭ la ekzemplo de Petrarca hungaran kanzonaron, la *Júlia-ciklon.* Balassi, la ĉiam eksplodi-preta estas tamen vera dokta poeto, kaj la modelo deviga por ĉiu poeto de la renesanco estas petrarkismo. Granda ono de Balassi-poemoj, samkiel de ĉiuj poetoj tiutempaj estas tradukoj (Balassi regis naŭ lingvojn). Ĉe la plejmulto de liaj „manierismaj" poemoj interna bezono pri memesprimado postulis „plibonigojn", kiuj estis fakte radikalaj tralaboroj. Tiel naskiĝis veraj hungaraj poemoj, brilantaj per elementa forto.

La agonion de Balassi ĉeestis ĉirkaŭ dudekkvin-jara junulo, *János Rimay.* La mortanta poeto tutan sian verkaron donis al Rimay, kiu verkis kaj poste eldonis funebran poemciklon pri sia majstro. Rimay estis la plej signifa reprezentanto de la malfru-renesanca poezio hungara.

Tradukis: *R. P. A.*

LEHEL

KOMPRESORA HEJMA FRIDUJO

HB 240 ***



HÜTÖGÉPGYÁR

Jászberény

Okaze de la Internacia Jaro de la Infano gajan antaŭtagmezon aranĝis la loka Konsilio kaj la Departementa Kultura Centro en Szentendre

Dancgrupo de la bazlernejo de Budakalász prezentas popolan dancon

La Asocio de la Unuiĝintaj Nacioj la jaron 1979 – en sia ĝenerala kunsido, okazinta en 1976 – deklaris la Internacia Jaro de la Infano. La Unuiĝintaj Nacioj (UN) difinis la celojn, vicigis en punktoj la konsiderindajn farendaĵojn kaj alvokis la registarajn organojn kaj la loĝantaron por aktive partopreni en la Internacia Jaro de la Infano. Samtempe alvokis ilin, ke ili kontribuu al la infanfondaĵo de la UN. Tiu fondaĵo servas la evoluigon de la porinfanaj institucioj.

Nia patrio – aliĝinte al la alvoko de la UN – formis specialan nacian programon por la planoj de la infanjaro. Oni fondis Landan Nacian Komitaton. La programo de la infanjaro konsistas el centraj aranĝaĵoj kaj krome el diversaj programoj de la asociaj organizaĵoj. La Landa Nacia Komitato zorgas pri la kunakordigo de la diversaj programoj.

La serio de la eventoj komenciĝis la 7-an febr. kun la solena inaŭguro de la infanjaro. Amaso de diversaj artistoj kaj elstaraj ensembloj kontribuis al la trihora artista programo, okazinta en la Budapeŝta teatro Erkel. La tuta programo estis dissendita per la hungara televido, kaj ankaŭ por ĉiuj socialismaj landoj.

Hungario

kaj la Internacia Jaro de la Infano

Jen la ĝis nun okazintaj eventoj de la Internacia Infanjaro.

22–23. Febr.	Okazis en la aranĝo de la Tutlanda Packonsilio scienca konferenco pri la temo: „La protekto de la infanoj kaj la prospero de iliaj rajtoj."
1. Marto	Oni inaŭguris la migran ekspozicion „Infanmondo en Hungario", aranĝitan de la Ŝtata Junulara Komitato.
8. Marto	La Tutlanda Virinkonsilio aranĝis publikan kunsidon okaze de la Internacia Infanjaro.
2. Aprilo	En la aranĝo de la Ministerio pri Kulturo okazis Tago de la Porinfana Libro.
7. Aprilo	Sanitara Mondotago sub la titolo „La sana infano estas – certa estonto", aranĝita de la Ministerio pri Sanitaro.
10. Majo	Rezultanonco de konkursoj, kiujn aranĝis la Ministerio pri Kulturo okaze de la Internacia Infanjaro.
14–18. Majo. 5.	Internacia Sportfilma Festivalo, aranĝita de la Tutlanda Korpedukada kaj Sporta Oficejo.
25. Majo	La Lernejsanitara Societo „József Fodor" aranĝis kunsidon pri la temo „La fundamento de nia futuro estas la sana infano".
1. Junio	Fotoekspozicio sub la titolo „La infano hejme kaj en la granda mondo", aranĝita de la Tutlanda Konsilio de Virinoj.
2–7. Junio	Internacia Forumo pri la temo „Internacia kunlaboro por la pli feliĉa kaj sekura estonto de la infanoj". La forumon, aranĝitan de la Ŝtata Junulara Komitato, partoprenis registaraj fakuloj kaj specialigitaj institucioj de la UN.
3. Junio	Internacia Infantago; centraj aranĝaĵoj de la landa pionirludo, aranĝita de la Asocio de Hungaraj Pioniroj.
17–24. Junio	„Internacia Renkontiĝo de Infankorusoj de Radioj". Organizanto: Hungara Radio.
21–23. Jun.	Scienca kunsido pri la temo „La problemoj de la mense postrestintaj infanoj", aranĝita de la Asocio de Hungaraj Kuracpedagogoj.
24–30. Jun.	Apud-Danuba Infanfolklora Festivalo, aranĝita en urbo Kalocsa, de la Konsilio de Departemento Bács-Kiskun.

Ankaŭ la somera kaj aŭtuna programo estos riĉa:

4–14. Jul.	Junulara Somera Universitato sub la titolo „Nia erao kaj la infano", aranĝota de la Naturscienca Sciencpopulariga Societo.
19–22. Jul.	7-a kongreso de la Internacia Asocio de Infandentistoj, aranĝota de la Hungara Dentista Asocio.
28. Jul.–13. Aug.	Internacia Infanrenkontiĝo en Zánka kaj Csillebérc, aranĝota de la Asocio de Hungaraj Pioniroj.
20. Jul.	Internacia tendumado de junaj san-gardistoj, aranĝota de la Hungara Ruĝa Kruco.
8–18. Aug.	Somera Universitato Savaria, pri la temo „La infano kaj la urbo", aranĝota de la Hungara Urboplana Societo.
Szept.	„Interplayexpo": Ekspozicio de Internaciaj Infanludiloj.
Okt.	Infanpsikologia Simpozio, aranĝota de la Psikologia Instituto de la Hungara Scienca Akademio.
Nov.	7-a Tutlanda Parlamento de la Pioniroj, aranĝota de la Asocio de Hungaraj Pioniroj.

Pupteatra prezentado sur la Ĉefplaco de Szentendre



PANORAMO

De dudek jaroj funkcias jam dumtaga tendaro en Királyerdő (Reĝa arbaro) de Csepel. Flugas la balancilo – kaj flugas la fantazio dum la fabelado en la tendaro.



Diósgyőr solenas

Ĉijare oni solene rememoras pri la antaŭ ducent jaroj mortinta Henrik *Fazola.*

La germandevena, talenta seruristo kaj horloĝisto, kiu dum la migraj jaroj spertiĝis ankaŭ sur ĉiuj terenoj de fero-prilaboro, eĉ en la geologio, akceptis en 1758 la inviton de la tiama episkopo de Eger. Ĉi tie ni povas ĝui eĉ hodiaŭ liajn belegajn artaĵojn el fero. Por plifaciligi la transportadon de fero, li serĉis kaj trovis bonkvalitan fero-ercon en la najbara montaro kaj fondis en 1771 sian altfornon kaj fero-fabrikon apud Diósgyőr.

Sur ĉi tiu loko funkcias nun la Metalurgia Entrepreno Lenin kun dek ok mil laboruloj. Per la nun modernigata ŝtaluzino jam la trian fojon renaskiĝas la metalurgio de Diósgyőr kaj honorigas la memoron de la fondinto Henrik Fazola.



Hejma somerumado

La someraj, dumtagaj tendaroj atendas dekses mil gelarnantojn post fino de la instrujaro. La budapeŝtaj distriktaj Konsilioj refreŝigis, kompletigis siajn tendarojn al kiuj aŭtobusoj portos ĉiumatene la gelernantojn de antaŭ la lernejoj. Sur deklivoj de arbaroriĉaj montetoj de Buda situas ĉi tiuj tendaroj, kie budapeŝtaj infanoj kiuj ne havas alian eblecon por somerumado pasigas la feriajn tagojn dum la tuta ferio. De mateno ĝis posttagmezo ili estas tie kaj fine la aŭtobusoj reportos ilin antaŭ la lernejojn. Pedagogoj deĵoras en la tendaroj kaj gvidas la interesajn programojn, ludojn.

Por bela medio

Komitato de la Patriota Popolfronto de departemento Vas decidis organizite kunlabori kun la fiŝhokistoj de sia departemento. Multaj el la pli ol kvar mil fiŝhokistoj de tiu regiono entreprenis libervole gardi la valoraĵojn, la ordon kaj la purecon de la naturo.

„Kunsonantoj"

Hungara-Aŭstria kontrakto estis subskribita pri kunlaboroj de radioj.Okaze de solena subskribo ĉeestis ankaŭ Josef Dengler, ambasodoro de Respubliko Aŭstrio en Hungario.



PANORAMO

Junaj artistinoj ludas kun la infanoj en la muzeo
Fotoj: Dezső *Tanka*

„Ni iru ludi en la muzeon!"

De du jaroj aranĝas jam la Etnografia Muzeo programojn por infanoj. Studentoj de la universitato, junaj muzeologoj preparas sin jam tagojn antaŭe por akcepti la grupojn da infanoj, de kvin ĝis dek kvin jaraj, kaj por enkonduki ilin en la fabrikadon de popolaj ludiloj, en pentradon kaj en prezentadon de folkloraj ludoj, popolaj kutimoj.

Ĉijare la prezentado de printempaj popolaj kutimoj estis speciale populara. Laŭ la ĝisnunaj spertoj la kunlaborantoj de la muzeo atendis kvincent infanojn kaj alvenis mil kvarcent! Sed ili ĉiuj trovis siajn amuzajn okupojn tutan posttagmezon inter la histori-etosaj muroj de la Etnografia Muzeo.

Grupoj ĝuis kaj ankaŭ mem prezentis pupteatrajn scenojn kun memfaritaj pupoj. Gaje ripetadis aliaj grupoj versaĵojn forpelantajn la vintron, ĉirkaŭdancante grandan pajlopupon, simbolon de la vintro.

En la aŭlo popolartistinoj instruis al la infanoj kiel pentri originalajn, buntajn paskajn ovojn. Amaso da kuiritaj ovoj jam antaŭpreparitaj atendis la infanojn! Bolis la farbo-fluaĵo, pretiĝis la skizoj sur la papero-ovoj.

Alia grupo prezentis scenojn de la paskolunda akvumado, deklamante la tradiciajn versaĵojn.

Ĉi tiuj infanoj, kiuj alkutimiĝas, ke la muzeo estas loko kun multaj interesaj, valoraj kaj imitindaj objektoj kaj la kunlaborantoj de la muzeo volonte kaj amike dividas sian scion kun ili, certe kun ĝojo kaj sperto vizitos muzeojn ankaŭ kiel plenaĝuloj. Krome, espereble ili gardos ankaŭ materiajn kaj spiritajn valoraĵojn ekstermuzeajn.



Subtera boatado

Denove estas malfermita la Groto de Lago en Tapolca, apud Balatono. La kristalpura akvo de la subtera lago estas iluminita de malsupre kaj prezentas mirindan fabelmondon al la spektantoj kiuj per boatoj povas viziti la faman groton.

Pioniroj jubileas

La centra Artensemblo de pioniroj prezentas sin jam de dudek kvin jaroj. La unuan dimanĉon de majo ili donis festan programon okaze de la jubileo en la Ĉefurba Operetejo.

Provas la dancistoj de la Centra Pionir-Ensemblo



Lerneja Esperanto-instruado en Hungario

Pri tiu ĉi temo jam aperis multaj informoj en la Esperanta gazetaro, pro tio nun mi deziras prezenti alian aspekton de la afero.

Dum la lernojaro 1978/79 Esperanto estis instruita al entute 1807 lernejanoj. El ili 663 estis 6–10 jaraj, 812 11–14 jaraj, 181 15–18 jaraj, kaj 125 estis pli ol 18 jaraj (altlernejaj kaj universitataj studentoj). En infanvartejoj 26 infanoj – 3–6 jaraj – lernis Esperanton.

Jen la bazo, sur kiu prof. Szerdahelyi povis celi la akcepton de Esperanto en la lernejan reformon. Kvankam estas evidente, ke pli reale estus enkonduki la Internacian Lingvon en la bazajn lernejojn, sed kompletan sukceson ne eblas akiri je unu fojo.

Do, por la bazgradaj lernejoj restos la ĝisnunaj intruformoj: la lingvokursoj kaj la studrondoj, kiujn organizas kaj aŭspicias plejparte la Pionir-organizaĵo (por 7–14-jaruloj).

En tiu ĉi tereno ni ĵus akiris belan rezulton: la Pionir-Asocio adaptis Esperanton en sian tre vastan konkursosistemon. Do la E-konkurso – havanta dekjaran tradicion en la E-Asocio – nun fariĝis agnoskita kaj anoncita far la Pionir-Asocio en sia jara programo. La konkurso okazas en tri etapoj: unue en la lernejo/pionirdomo, la unuaj premiitoj de ĉiu aĝgrupo rajtas partopreni la departementan konkurson, kaj ties unua-premiitoj la landan konkurson (ĝi okazas ĉi-jare en la granda internacia pionirtendaro Csillebérc (monto en Buda).

Organize kaj finance la konkurson la Pionir-Asocio prizorgas, sed fake kompreneble tion faras la Instrua Komisiono de HEA.

La programon de la ĉi-jara konkurso ni dediĉis al la Jaro de la Infano. La slogano de la konkurso estas: *„Ekkonu la viron de alilandaj infanoj!"*. Koncernaj temoj troviĝas en la postularo de ĉiu aĝgrupo. La necesajn konojn la gelernantoj povas akiri plejparte per korespondado. (Vd. Budapeŝta Informilo 2/79, p. 18 kaj 3/79, p. 7.)

Ĉiujare okazas lernokonkurso ankaŭ por la mezlernejanoj. Ĝin organizas ankoraŭ la Instrua Komisiono de HEA, sed konsidere, ke E. akceptiĝis en la gimnazioj, ni celas efektivigi, ke ankaŭ la E-konkurson anoncu la Ministerio pri Klerigo en sia bulteno, kune kun la aliaj lernokonkursoj.

Okaze de la Jaro de la Infano – surbaze de pli fruaj pretendoj – ĉi-jare ni organizas landan renkontiĝon por element-klasanoj, kiuj lernas E-on. Ludante ili ekzercu sin en la lingvo, ili lernu, kaj interkonatiĝu kun siaj infan-kamaradoj.

Por efektivigi la instru-programon, ni klopodas daŭre pliperfektigi la E-instruistojn. Ĉiusomere ni okazigas pedagogian seminarion, lingvo- kaj parolekzercojn por pedagogoj; laste tio okazis en urbo Gyula. La seminarion/kurson HEA apogas finance. Sendube la plej efika kaj altnivela pliperfektigado estas la koresponda studado en la Universitato „Eötvös Loránd", kie ankaŭ nun partoprenas 13 geinstruistoj, kaj jam pluraj kandidatoj anoncis sin por la nova trijara kurso ekde 1980/81.

Zsuzsa *Barcsay*
estro de la lerneja sekcio de IK de HEA

Pionira Internacia Tendumado

En la listo de la ĉijaraj esperantistaj renkontiĝoj modeste sin kaŝas Pionira Esperantista Tendumado (PIT), kiu la 12-an fojon akceptas inter 120–140 esperantistajn infanojn en la impona „pionira urbo" apud la vilaĝo Zánka, feriejo ĉe la lago Balatono.

La naskiĝo de PIT ŝuldiĝas al la rapida ekevoluo de la movado en la urbo Pécs post la sukcesa 22-a Internacia Junulara Kongreso, okazinta en 1966. La taskon de la aranĝado dum la unuaj jaroj surprenis la gvidantaro de la Asocio de la Hungaraj Pioniroj en Pécs, kaj la tendumado okazis en diversaj lokoj, ĉiam laŭ la konkretaj ebloj.

Sed la interesiĝo kreskis de jaro al jaro, kaj la aranĝaĵo devis fariĝi tasko de la landa centro de la Pionira Asocio, kiu lokigis la tendumadon en la nove konstruita „pionirparadizo" ĉe Zánka, kie fakte tute mankas tendoj: la infanoj loĝas en tre modernaj, komfortaj konstruaĵoj, kaj havas je sia dispono abundajn eblojn por ludi, ripozi kaj lerni.

PIT havas du celojn, tute harmoniajn inter si. Ĝi volas profundigi la senton de internacia amikeco en la infanoj, kaj aliflanke, ĝi volas certigi eblon por viva praktikado de Esperanto. La infanoj ekŝatis ĝin: deziras ĝin partopreni kutime duoblo de la ebla nombro, kaj aparta komisiono devas okupiĝi pri selektado de la sinanoncoj.

En la Internacia Jaro de la Infano estas turnita aparta atento al la plej junaj esperantistoj. Espereble, post la 31-a de decembro tiu ĉi atento ne malaperos, sed kreiĝos kaj laboros multaj institucioj, similaj al PIT, kiu ĝis nun akceptis pli ol 2000 infanojn, por doni al ili gustumaĵon el la plej konkreta internacieco.

REVUO DE REVUOJ

Kara mia Redaktoro!

Vi komisiis min – ho, kiel facilanime! – modestan kunlaboranton, kiel diligentan boranton en la gazet-amaso, ke nun preterlasante la gazetan *mason,* esceptmaniere mi bonvolu skribi iaspecan superrigardon pri la altaj kvalitoj de la E-gazetaro, almenaŭ pri la troveblaj, ja, pri altaj kvalitoj. Kiel kutime en ĉi rubriko, ankaŭ nun la bultenoj aŭ revuoj de sciencbranĉoj restu ekstere, kvankam troviĝas kelkaj elstaraj inter ili, enhave kaj aspekte, (kompreneble kompare al siaj redakciaj celoj): LA MEVO kiel revo por pluraj ne tianivelaj, la HOMO KAJ KOSMO, tiu lertega sciencinforma revuo *por junuloj* (sed ne nur por ili!), pli da ili mi ne volas mencii nun.

Mi promesis, sed ne certe, ke mi retenos min de okazaj disputoj, ĉar se elegantaj, ne-arbitraj, la movado bezonas tiajn, servantajn malofte ne kiel dis-, sed kiel kun-putoj. Mi ofte vidis jam, kiom da legantoj kaj alparolemuloj bravaj kuniĝis ĉirkaŭ tiaj, ververe kunigaj afer(et)oj, profundaj putoj. Tamen nun, kara Redaktoro, mi alvenas al flanko vere ĝojinda, ĉar mi sentas serioza devo *demeti la ĉapelon* antaŭ nia nuntempa literatur-aro, precipe vid-al-vide de la gazetaro. Preskaŭ svarmas en niaj revuoj *kulture* interesaj, ofte altnivelaj artikoloj, eseoj kaj studoj – oni nur disponu pri tempo sufiĉa por legi ilin ĉiujn. Foliumanto de la revuaro ie en buduaro (ĉar en budo-aro de kongresoj plejparte ne akireblaj) estas surprizita pro la vasta temaro de la valoraj skribaĵoj. Nur surfacan bildon eblas prezenti, igi eksenti iom el tiu *nivela progreso,* per kelkaj mencioj, sen intenco klasifiki, eĉ ne klasigi, nur ie-tie ĉerpi.

Jen ekzemple la admirinde varia OOMOTO, kun „Dialogo" de la mezepoka Nikolaus *Cusanus,* tradukita el latina originalo far filozofio-profesoro Kenryo *Kanamatu;* eseo de K. *Piĉ* pri certaj trajtoj de nia literaturo, certe laŭ sia intenco, diskuteblaj ideoj; kaj tuta serio pri okulmalsanoj de d-ro Jaime *Scolnik.* Jen prezentita jam la karakteriza *internacieco* en multaj revuoj, eĉ sen mencio de nacioj de la supraj aŭtoroj.

Gravajn kontribuaĵojn oni rajte atendas kaj ofte ricevas de la specifaj kulturaj revuoj. Oni povas nur laŭdi la kunlaborantaron de la KULTURAJ KAJEROJ – kvankam mi ne kutimas alaŭdi trilkante ĉar io aperas Esperantlingve – pro la fake, stile altnivelaj kulturhistoriaj diversaĵoj en bona senco de la popularigo. Malpli distra legaĵo, plie studoj pri sciencaĵoj estas la varoj de la LITERATURA FOIRO. La konata svisa inklino al la internacieco bone prezentiĝas sur tabloj de la Foiro, kie la libro-recenzoj okupas apartan atelieron de ranghavaj metiistoj. Altkvalite rula stilo vestas, pardonu, enpakas la „varojn" tie eksponitajn el kiuj mi preferas ankaŭ (foje pli) la lingvistikajn temojn, krome tamen plezure mi „aĉetas" la strikte literaturajn verketojn.

Kiel vi bone vidas, mi limigas mian trarigardon nun precipe al science orientitaj artikoloj, kaj laŭeble evitas enŝovi aliajn, ekzemple poeziajn flankojn de la revuoj. Tre kontente mi taksas grava fenomeno, ke origine nur bultenoj, movadcelaj gazetoj pli ofte ol iam publikigas gravajn studojn. Pluraj japanaj bultenoj estas menciindaj tiurilate; krome LA SKOLTA MONDO, pri antikva historio aŭ naturo, LUMO el Kanado, KOMUNA ESPERANTO-GAZETO de Nederlando, la bulgara, ĉeĥa, slovaka bultenoj, por ne paroli pri la jam-jam Mez-Eŭropan rolon plenumanta INFORMILO de la Budapeŝtanoj, ĉiuj jam konkure publikigas – plejofte – gravajn, nove esploritajn studojn pri Eo, kiel homara fenomeno, movada studindaĵo, kaj pri ties historio. Aparte laŭdindan agadon plenumas PACO kaj en la lastmenciita sfero N.Z. *Maimon* kaj B. *Golden* surbaze de mirinde diligenta – eble – lastminuta esplorado pri la komencoj. BRITA E-ISTO kaj Eo En SKOTLANDO havas sian altan pozicion nekontesteble.

Ŝajnas, ke niaj gvidaj revuoj, ESPERANTO kaj HEROLDO ĉiam volonte malfermas siajn paĝojn por movadhistoriaj studoj, vere memkompreneble. Feliĉe por vasta legantaro, ambaŭ aperigas ankaŭ alispecajn eseojn kaj studojn: niaj legantoj ricevis jam plurfoje informojn, ekzemple pri altkvalitaj sciencaj aldonoj de Heroldo, foje pri kritikinda tia skribaĵo. Estas certe multe da manko ankoraŭ en nia gazetkolportado, disvastigo. Esenca premiso restas tamen, la enhava kvalito de revuo, kies *tipan altiĝon* mi skize klopodis desegni laŭ kelkaj trajtoj.

Jaro de Infanoj! Ĉu forgeseblaj estas infanaj gazetoj? Ĉu iliaj sindonaj redaktoroj kaj kunlaborantoj? Certe multaj el la etaj legantoj kreskis pli granda por iĝi poste aktivulo ĉirkaŭ la ege serioza junulara revuo KONTAKTO. Nia movado jam delonge preparis infangazetojn, diversloke, kaj per malkonforma sukceso, pro la neeviteble ekzistantaj problemoj de la diversaj aĝoj. La JUNA AMIKO jam de sep jaroj plenumas grandiozan agadon sub redaktado de Géza *Kurucz;* ŝajnas, ke estas trovita la modela formo de infangazeto por diversaĝaj geknaboj, kun spicoj de bonhumoro. Internacia (!) redakcio kaj konvena, kolora aspekto altiras ĉiam novicojn al la infanmovado. Ĉu grave? Ne forgesu, ke infanoj ĝenerale ne multe veturas, ne sukcese korespondadas, do restas malmulte da internacia kontakto por ili: ligilo, distro tre praktika, ofte sola, povas estiĝi por ilia lingvo-utiligo la bona, la pedagogie lerte redaktata „amiko".

KALEJDOSKOPO redaktita de s-ino Ethel *Prent,* faras same, por la pli etaj infanoj, sian nefacilan agadon jam de ok jaroj. La multobligita bulteno vekas plian interesiĝon per sprita maniero: ĝi estas farita sur *diverskoloraj* paperoj, kaj plaĉaj desegnaĵoj helpas la apenaŭ-legantetojn de la lekantetoj kolorindaj. Ĝi estas internacia etgazeto – kaj kontraste mi fine mencias similan, sed nur lokan, departementan, tamen belkovrilan, *monatan,* grandliteran, multobligitan PIONIRON, el la sudhungara urbo *Pécs.* Depost 13 jaroj eldonas ĝin bravmaniere la loka pionir-organizo („hejmo"), kaj la konata pedagogino H. *Hegedüs. Dum nia aplaŭdo* ni memoru ankaŭ tian venkendan malfacilaĵon, ke ĉiuj tri gazetoj prezentas al la etuloj *pure E-lingvan tekston!*

Do, kara Redaktoro, per tiu kolumno akceptu de mi la „rubriketon", kiel briketon al la tutjara kampanjo: „Revueto de revuetoj"

Ervin *Fenyvesi*

Ferpordego (Vaskapu)

D-ro Ferenc László

Elstara agado de Stefano Széchenyi en la evoluigo de la hungarlanda akvomastrumado

2

Inter la zorgoj de Stefano *Széchenyi* – sur tereno de hidrologio – havis gravan lokon la reguligo de Danubo kaj la navigado sur ĝi. Por akiri fidindajn konojn pri la eblecoj de Danuba navigado kaj pri la farendaĵoj por solvi tiun problemon, li decidis, ke li mem veturos laŭlonge sur Danubo. Kiel ekspertiziston li prenis apud sin la eminentan akvoinĝenieron de tiu epoko Jozefon *Beszédes* kaj en la lastaj tagoj de junio 1850 ili ekveturis.

Tiu vojaĝo sur Malsupra-Danubo daŭris preskaŭ kvar monatojn. La impresojn akiritajn dum la ŝipveturo oni povas ekkoni ne sole el lia taglibro, sed tiuj impresoj aperas en preskaŭ ĉiuj plipostaj kontempladoj pri Danubo kaj navigacio.

Post reveno – en la oktobra parlamenta-sesio en *Pozony* (nun *Bratislava*) li lanĉis fortan agitadon en intereso de la reguligo de Malsupra-Danubo kaj ĉefe de la Ferpordego.

Intertempe tiom antaŭeniris la laboroj de „Danub-mapizado*" ke tiuj povis doni fidindajn orientiĝojn pri transformiĝoj de fluejcirkonstancoj de la riverego. Tio faciligis la denovan organizon de vaporŝip-navigacio, nun jam pli esperiga. Je iniciato de J. *Andrews* kaj J. *Prichard*, anglaj ŝipkonstruistoj, jam en 1829 fondiĝis *„Első szabadalmazott Duna Gőzhajózási Társaság"* (Unua patentita Danuba Vaporŝip-Asocio), kiu en 1830 surakvigis sian unuan ŝipon *„Franz I."*

Széchenyi vigle atentis tiun entreprenon. Post la komenca singarda sindeteno li iĝis ne sole akciulo, sed la plej aktiva organizanto, eksperto kaj evoluiganto.

Nove kaj denove li laŭiris ĉiun etapon da Danubo por pritaksi la farendaĵojn, kontroli la ricevitajn indikojn. Li

*(en la orig. teksto: *Duna-mappatio* (pretigo de Danub-mapo)

Jozefo Beszédes, eminenta hidroteknika inĝeniero de la reform-epoko, kunlaboranto de Széchenyi

Ferpordego (Vaskapu)

organizis, agitadis, akceptis diplomatian mision en intereso de evoluigo de Danuba ŝipveturado, de forigo de obstakloj kaj ĉefe de reguligo de Malsupra Danubo.

Premiso de evoluo de vaporŝip-navigado estis la Danub-reguligo kaj purigo de ĝia fluejo. Li turnis sin por helpo al kanceliero *Reviczky.*

Széchenyi metis sur tagordon la projekton de konstanta ponto inter *Peŝto* kaj *Buda* (tiam tiuj estis du apartaj urboj). Tiu ponto kompreneble havis rilatojn ankaŭ kun la navigado. Li sukcesis akiri la apogon de la palatino* *Jozefo,* organizis la „pont-komisionon". Kiam en 1832 kune kun grafo Georgo *Andrássy*** li veturis al Anglio pro kaj por la problemo de la ponto, denove li pristudis la teknikajn instalaĵojn kaj navigaciajn kondiĉojn de la rivera vaporŝipnavigado, – kunlige kun tiuj ankaŭ la plej novajn metodojn de la kanal-, voj-, kaj fervojkonstruado. Post reveno li proponis al la Danuba Vaporŝip- Asocio konstrui kromajn du vaporŝipojn kaj li efike intervenis por akiri la necesajn financajn rimedojn.

En junio de 1833 li estis nomumita reĝa komisaro pri la reguligo de Malsupra Danubo, kaj post unu monato li ekiris tien kun la necesaj mandatoj.

Por la teknika gvidado de la laboroj li elektis Paŭlon *Vásárhelyi,* kiu antaŭ kelkaj jaroj transpenis la direktadon de la *„Duna-mappatio"* kaj ĝuste en tiu tempo gvidis la geodeziajn laborojn sur Malsupra Danubo.

Eluzante la favoran koincidon de la cirkonstancoj, Széchenyi kunligis praktike la geodezian laboron kun la pretigo de la riverreguligaj planoj, komencinte samokaze la plej urĝajn laborojn.

Vásárhelyi kun ĝojo staris apud lin. En siaj reguligaj planoj, pretigitaj dum tre mallonga tempo, li proponis en la etapo *Vaskapu** (Ferpordego) parte konstruadon de kanalo, parte instaladon de ŝveliga digo kaj de kluzadvirko. En 1834 Széchenyi veturigis kun si inĝenieron Vásárhelyi al Anglia studvojaĝo. Tie ili pritraktis liajn planojn ankaŭ kun ekspertoj de hidroteknika konstruado. Uzante la okazon ili aĉetis labormaŝinojn, sipmaŝinojn, kaj persone elprovis antaŭ aĉeto kasonon, krome Széchenyi faris paŝojn por akiri riveran dragmaŝinon funkciantan per vaporo.

Post tiaj preparoj ekiris efektive la reguliga laboro sur Malsupra Danubo.

En tiuj jaroj Széchenyi plurajn monatojn pasigis surloke kaj en la najbaraj landoj. Li akiris la senkondiĉan apogon de serba monarko Milos *Obrenovich,* li kreis bonan rilaton kun la Moldavia monarko Aleksandro *Ghika* kaj precipe kun la turkaj instancoj ofte farantaj malfacilaĵojn ĉefe pro la rok-eksplodigoj. Li venkis la obstakladojn de civilaj kaj armeaj organoj, la diplomatiajn malfacilaĵojn, zorgis pri provizado de la laborejoj per ilaro, provianto kaj materialoj. Li zorgis, ke la bonvola protektado de la palatino restu daŭra, kaj tiel li sukcesis per interveno akiri por la laboroj entute 550,000 forintojn dividite por pluraj jaroj (el la t.n. „Salfondaĵo").

Malgraŭ tio, ke tiu apogo ne estis sufiĉa por ebligi la konstruadon de la planita fluejkanalo, tamen sukcesis, ke ĉirkaŭ 4000 m^3 da rokoj estis eligitaj el la fluejo per eksplodigo, ke tiel ĉe meza akvonivelo estu la Ferpordego navigebla ankaŭ por vaporŝipoj.

**palatino:* anstataŭanto, reprezentanto de la reĝo

**Georgo Andrássy (1797–1872), amiko, adepto de grafo Széchenyi, lia kunvojaĝanto al Anglio, multe laboris por reformoj, kaj per dekmil forintoj kontribuis al fondo de Hungara Scienca Akademio.

*Tiam la tuta maldekstra bordo de Danubo ĝis Ferpordego apartenis al Hungario, la dekstra bordo al Serbio ekde Beogrado, – nun la lasta ĉk. 130 km-a etapo maldekstra al Rumanio, la aliaj ambaŭbordaj al Jugoslavio.

Ordigita Danub-etapo



La drenado de Balatono ĉe Siófok (1863. okt. 25.)

Samtempe sur la maldekstra bordo de la riverego, kontraŭflanka al la iama Romia haŭlo-vojo, de *Bazias* tra *Orsova* ĝis la *Rumania Turnu-Severin* – li konstruigis bordan vojon eminentan, kiu en la intermonto *Kazan* gvidis, tranĉita en la rokmurojn en longeco de 120 km-j, kaj ebligis funkcigi la trafikon. Dum la vojkonstruado Vásárhelyi kaj liaj inĝenieroj – per apogo de armeaj ekspertoj forigis per eksplodigoj pr. 150.000 m^3 da rokoj el la rokmuroj ĝis tiam iritaj nur de ĉamoj.

La trapaso de la unua vaporŝipo *„Argo"* tra la Ferpordego – okazinta la 14-an de aprilo 1834, – estis triumfo de la fortostreĉoj de Széchenyi! Nun jam ebliĝis, ke la regula navigado ekiru en la tuta longo de Danubo de *Vieno* ĝis *Galati (Galatz)* – kaj en 1935 per la entrafikigo de *„Maria Dorothea"* – ĝis Konstantinopolo (Istambulo).

Sed liajn rezultojn sekvis malmulte da rekono.

La financan apogon post la morto de imperiestro Ferdinando la registaro tiel subite, neatendite rifuzis, ke la aktualajn salajrojn kaj elspezojn Széchenyi devis pagi el sia propra kapitalo, se li ne volis veni en morale nepermeseblan situacion. La palatino promesis meze de septembro asignon de 20 miloj da arĝentaj forintoj por la laboroj ĉe Malsupra Danubo. Post kelkaj tagoj li jam sciigis, ke pro malpermes-dekreto li ne povas plu eĉ unu krejceron (= du helerojn, = du centonojn de la tiama forinto) elpagi.

Li plu ne sukcesis atingi, sisteman materialan apogon por daŭrigo de la laboroj, tamen definitive neniam li ĉesigis tiujn. Precipe li okupiĝis kun la daŭrigo kaj konservado de la maldekstra bordvojo estante prezidanto de la trafika komisiono, poste ankaŭ kiel ministro. Li ĉiam deklaris necesa la daŭrigon de reguligo de Ferpordego kaj pretfaron de la laboroj. En 1842 li iris ankoraŭ al Ferpordego, kaj per sia propra elspezo pretigis, kelkajn malgrandajojn kaj por daŭrigo de tiuj laboroj li prezentis novajn kaj pli novajn proponojn, sed la necesan financan apogon li plu ne ricevis.

Malgraŭ la granda komenca elano devis pasi pr. duona jarcento, ĝis kiam povis denove ekiri la laboro de li komencita. La laboroj faritaj inter 1890–1898 akiris merititan rekonon por la hungara hidrologia inĝenieraro kaj ĝis la duono de nia jarcento ili kontentigis la bezonojn – jam internaciajn – de la Danuba navigado.

La reguligajn laborojn respondantajn al la pretendoj, – saltgrade altiĝintaj pro la postulaĵoj de la plej nova epoko, – oni sukcesis fini en rumana-jugoslava komuna entrepreno nur en la plej lastaj jaroj. Inter 1964–1972 estis konstruita la potenca akvonodo, kiu per sia du-ŝtupa ŝipkluzo-paro ebligas, ke Danubo, kiel ŝipvojo, estu plenvalora etapo de la transkontinenta akvovojo-reto de *kanalo Danubo-Majno-Rejno.*

La reguligo de *Balatono*, trezoro-lago de nia patrio venis en la vicon de tiuj urĝaj hidrologiaj laboroj – per la apero de la eminenta hidroteknika inĝeniero Jozefo Beszédes, – kiuj atendis la solvon. En bonŝanca minuto, en 1825 prezentis *Beszédes* antaŭ la parlamento sian raporton pri la akvoreguligaj laboroj sur suda bordo de Balatono –, ĝuste tiam, kiam Stefano Széchenyi paŝis en la publikan vivon. Tiel la afero trovis en la persono de la eminenta ŝtatisto tian apoganton, kiu donis multfacan helpon por ties efektivigo.

Homo de la hodiaŭo, kiu serĉas senstreĉiĝon, refreŝiĝon ĉe Balatono, eble eĉ ne konjektas, kiom da fortostreĉoj, kiom da krea ago estis necesa por la vojo ekde la antaŭ unu kaj duonjarcentaj statoj ĝis la hodiaŭaj kulturitaj cirkonstancoj. Kaj tiujn kreajn agojn Széchenyi fruktodone stimulis. Konvinke atestas tion la versoj de la samtempulo-poeto, Johano *Garay:*

„Tra miljar' novale staris por hungar'
Senkulture, senprospere la belaga Balaton'.
Széchenyi venis: lag' ektimis de la progresul'.
„Li min ĉenos!" – diris lag' kun sin' ribela por opon'."*

En la unua duono de la XIX-a jarcento urĝigis duspeca pretendo la reguligon de la akvosistemo de Balatono, nome: la reguligo de la akvonivel-ŝanceliĝo kaj la drenado de la marĉaj boskoj. En tiu tempo la forkondukebla kvanto de

*La ritmon adaptante al la E-a, tr. A.P.



La reguligita Balatono

akvo per kanalo Ŝio estis tiom malmulta, ke la akvonivelon de Balatono reguligis unuavice la naturaj precipitaĵoj kaj la haladziĝo, vaporiĝo.

Kio estas la klarigo de la elformiĝo de Balaton-bordaj marĉaj boskoj, – ni povas meti tiun demandon. La klarigo estas sekva:

Post la militpereo ĉe *Mohács**, la loĝantaro de la regiono – manke de milita forto – klopodis bari la turkan invadon per laŭplana marĉigo. Tiam okazis la fermo de la kanalo Ŝio, kio rezultis la altiĝon de la akvonivelo de Balatono kaj la inundon de la ĉirkaŭaj boskoj.

Krom la ĉefaj akvofluoj: *Zala, Ŝio, Sárvíz* kaj *Kapos* pretiĝis ankaŭ sur aliaj flankriveretoj, multnombraj fluejfermoj, unuparte pro kaŭzoj fiŝisto-protektadaj, aliparte por akvoenergio-utiligoj (ĉefe per akvomuelejoj), celinte kreon de grandaj lag-mastrumadoj. Tiuj intervenoj gvidis al tiaj grandmezuraj marĉiĝoj sur la koncernaj regionoj, ke la etendiĝo de la marĉoj multe superis tiun de la pli fruaj praaj marĉaĵoj.

En mezo de la dekoka jarcento sur kanalo Ŝio staris entute 18 akvomuelejoj, kaj ties digoj tiom ŝveligis la akvon kaj faris marĉoza la fluejvalon, ke en longaj etapoj iĝis nerekonebla eĉ la originala fluejo: ĝi tute perdiĝis sub la densaj vegetaloj, kovrantaj la valon.

Similaj estis la valoj de riveretoj Kapos kaj Sárvíz. Sur la unua staris 17 muelejoj, dum sur la dua en departemento *Fejér* staris 6, kaj en dep. Tolna 9 muelejoj. Iom grandaj lagmastrumejoj estis apud lok-sidiĝoj, urbetoj *Szekszárd, Simontornya, Ozora.* Ŝveligan efikon havis ankaŭ la talusoj servantaj por transirado.

*1526: la turkoj venkis la hungaran armeon proksime al tiu Sud-Danuba urbo, kaj tio kaŭzis tri-jarcentan subiĝon de la lando.

En la dekoka jarcento la ekonomia vivo de la provinco estis bazita sur la marĉ-teritorioj ebligantaj la vivoformon de fiŝistoj, subĉielaj krud-paŝtistoj kaj de muelejoj. Karakteriza por tio estas, ke sur tiu Trans-Danubia teritorio (en departementoj *Veszprém, Fejér, Tolna, Somogy* kaj *Baranya*) laŭ la etato en 1720 estis entute 319 muelejoj funkciantaj. (Signifon de tiu indiko ni povas taksi nur, se ni scias, ke ekz. laŭ raporto de vic-distriktestro de departemento Tolna el jaro 1710, dum la turka invado sur teritorio de tiu dep. restis nur 21 loĝataj komunumoj, vilaĝoj, kaj el inter ili eĉ la plej granda ne havis pli ol 20 kortodomojn.

La energio-fonto de la restinta industrio de la regiono estis la akvoenergio: en *Hajmáskér* sur rivereto *Séd* (ŝed) estis segil-muelejo kaj drap-kompaktilo, ĉe *Pétfürdő* sur akvo de *Péti-víz* segilmuelejo kaj fer-marteladejo, en *Bodajk* sur rivereto *Gaja-patak* tapiŝ-kompaktilo.

Por resumi la staton antaŭ la reguligo oni povas konstati, ke la mezo de la akvosistemo Balatono-Ŝio – Sárvíz konsistis el tri koneksaj marĉ-serioj. Unu komenciĝis okcidente per rivereto *Zala* kaj per ĉirkaŭaĵo de *Kisbalaton* (Et-Balatono), daŭriĝis per la marĉoj ĉirkaŭantaj Balatonon, poste turniĝanta suden etendiĝis ĝis *Simontornya,* kie ĝi disvastiĝis kaj grandega marĉaĵo akceptis la akvojn. La dua estis la valo de *Sárvíz,* kiu ekiris el *Sárrét* situanta inter *Székesfehérvár–Várpalota–Hajmáskér* kaj forportis la akvojn en pr. nord-sud-direkta linio: *Sárkeresztúr–Simontornya–Szekszárd–Báta* el la marĉplena valprofundo al la plataĵo *Sárrét* apud *Szekszárd* kaj de tie en Danubon. La tria estis la valo de rivereto *Kapos,* kiu enfluis en tiun longan, mallarĝan marĉejon *Sárvíz.*

La valo de Ŝio do estis antaŭ la akvoreguligo koneksa



Modelo de Balatona vaporŝipo Kisfaludy

Fiŝistoj sur Balatono

marĉejo. La etendiĝo de la marĉoj ampleksis en la jaroj 1800-aj proksimume 3500 hektarojn, (sen la marĉoj de Kapos-enfluejo).

Ĉe Siófok la akvon de Balatono ŝveligis muelej-digo konstruita el fasĉinoj kaj tero, – ĝi servis por la durada muelejo de la kanonikejo de *Veszprém.* En la digo estis libera kaj radgvidaj kanaletoj kun kluzoj. La superflua akvo de Balatono estis forkondukebla ekskluzive nur tra tiuj kanaletoj, la reguligo de Balatona akvonivelo dependis sole de la arbitro de muelisto. Sed se Balatono inundis, la du kanaletoj ne estis sufiĉantaj por ellasi la akvosuperfluaĵon, la akvo trarompis la digon, kaj kaŭzante grandajn inundojn, torentis en la valon de Ŝio.

Simontornya (fama pri sia antikva Turo de Ŝimono) en tiu tempo situis sur insulo, kiun ĉirkaŭis du branĉoj de *Ŝio.*

Sur landkarto nomata *Krieger* (deveninta el 1766) montranta la staton antaŭ la reguligo, estas bone videbla la bordo de Balatono kun siaj kanejoj, marĉoj, akvokovritaj kampoj.

Por kuraci la malutilojn, imperi-estrino *Maria Terezia* ordonis forigon de la nocaj muelejoj. Tion ĉe kelkaj muelejoj oni efektivigis, sed pluraj restis plu.

Ioman plibonigon por la teritorioj ĉirkaŭ Balatono alportis, ke la muelejo de Siófok en 1821 forbrulis kaj oni ne plu rekonstruis ĝin. Post malkonstruo de la muelej-digo de Siófok la akvonivelo de la lago malaltiĝis per pr. 90 cm., kaj la teritoriojn liberiĝintajn sur suda bordo oni povis utiligi por agronomiaj celoj.

Tamen post la forigo de la muelejo de Siófok estis pligrandigita la muelejo ĉe *Kiliti,* kaj tiel ne okazis esenca plibonigo en la valo de Ŝio. La ŝveligo far la muelejdigoj plu marĉigis la valon, kaj nur sur kelkaj lokoj oni povis trapasi en la neireblaj marĉaroj. Kaj se Balatono tro malaltiĝis, la marĉaro sekiĝis, la muelejoj haltis, kaj la valfundon kovris netransirebla sovaĝa vepro.

La etapon de Ŝio inter *Sióagárd* kaj *Simontornya* en 1811 la Societo *„Sárvízi-társaság"* komencis elfosigi sed nur inter Simontornya kaj *Harc.* Samtempe *„Kaposvizet Levezető Társulat"* (Kapoŝ-akvon forkondukanta Asocio) elfosigis la fluejon de Ŝio inter Simontornya kaj Ozora.

Post la sukcesinta reguligo de Sárvíz kaj Kapos venis sur tagordon la aranĝo de Ŝio. Jozefo *Beszédes* – kiun ni jam plurfoje menciis, pretigis planon por la malaltigo de la akvonivelo dde Balatono, ke ĉiuj marĉaj teritorioj ĉirkaŭ la lago sekiĝu. La parlamento (j. 1827) ordonis la drenadon de Balatono.

La altranga decido rilate la reguligon estis neforlaseble necesa, sed tio en si mem signifis nur unu el la kondiĉoj. Krome estis necesa la organiza talento kaj renomo de Széchenyi, ke tiu decido ja realiĝu.

Krom la Balatona reguliga afero Széchenyi ekpaŝis apoge ankaŭ por la evoluigo de Balatona vaporŝip-veturado, kaj tion li finance apogis, kiel multajn aliajn aferojn. Sian opinion rilate tion, li pritraktis en ampleksa broŝuro.*

„El tre multaj flankoj mi estis alvokita, – li skribis la 1-an de sept. 1845 al Francisko Deák, *kiu estis supera juĝisto de granda influo vivanta apud Balatono en departemento Zala – ke mi lokigu malgrandan vaporŝigpon sur Balatono. Sekve de tio kune kun pluraj eksterlandaj fakuloj, kiuj por aranĝi aliajn siajn aferojn, estis venintaj al Vieno kaj al Peŝto, proksimume antaŭ ses semajnoj mi estis en* Füred (Balatonfüred, la fama kuracbanejo por kormalsanuloj). *En la afero ne troviĝas speciala malfacilaĵo.*

Vaporŝipo sur Balatono, alportus tute novan kaj apenaŭ antaŭkalkuleblan vivon kaj viglecon en tiun pitoreskan pejzaĝon de Hungario . . . Pri tio mi estas perfekte konvinkiĝinta; atentante pri tio, ne pro mi malsukcesus, ke paŝu en la vivon la granda ideo, kaj se Vi ne forprenos de tio Vian manon, mi neniom dubas pri la sukceso".

La saman penson li eksplikas pli detale en sia broŝuro pri la *„Balatona vaporŝip-veturado"*:

„Eble plej agrable serenan hungaran pejzaĝon de Hungarlando ellevi el ĝia neglektita stato estas tia vidpunkto, kiu kuŝas en plej proksima interesiĝo de ĉiu fidela patrioto . . . Ĉar la apero eĉ de unusola vaporŝipo sur Balatono farus tian ŝanĝon sur la nuna dormetanta esto de tiu ĉi superbela akvospegulo, – tiom ĝi edukus la vivoforton de la tuta pejzaĝo, kaj sekvigus tiel longan ĉenon de la plej bela kaj antaŭe ne prikalkulebla evoluado, laŭ kiu la bienposedantoj kaj loĝantoj de (la komitatoj) Somogy–Veszprém *kaj* Zala *sin trovus inter tia stato, kiu estus senkompare pli agrabla kaj utila ol la ĝisnuna.*



La hodiaŭa Balatono ĉe Keszthely

Kvankam tiu transformiĝo ne estos okazanta dum unu sekundo, ĉar – se ni ne volas nin mem trompi – verdire ankoraŭ en tre malevoluinta stato velkadas la Balatona bordregiono; sed ke tio antaŭe aŭ poste certe efektiviĝotas . . . tio ne suoferos eĉ la plej etan dubon."

Lia reputacio kaj organiza laboro baldaŭ donis elanon al la afero. Printempe de 1846 fondiĝis la *„Balaton Gőzhajózási Társaság"* (Balaton-Vaporŝipnavigacia Asocio"). Oni petis Ludovikon *Kossuth* pretigi la statuton de tiu asocio, kaj la statuton mem Széchenyi prezentis por konfirmo al la palatino. Li montris bonan ekzemplon per la akciomendo.

La lignan korpon de la ŝipo oni pretigis je lia interveno en la ŝipfabriko en *Óbuda* (Old-buda) kaj en apartaj pecoj per specialaj veturiloj, „sur aksoj" ili estis transportitaj al Balatonfüred, ĉi tie kunmetite oni surakvigis la ŝipon kaj ĉi tie oni muntis ĝin per ŝipmaŝino de 40 ĉevalpovoj transportita el Anglio, el la fabriko *Pann*. La ŝipo – laŭ lia deziro – estis nomita *„Kisfaludy"* laŭ la nomo de la poeto de Balatono.

Dankebla estas al la organiza elano de Széchenyi, ke la vaporŝip-entrepreno povis ekfunkciigi la unuan Balatonan vaporŝipon jam en la fondiĝa jaro. Ĝuste tial, por rekoni lian kunlaboron, oni lanĉis la ŝipon la 21-an de septembro, okaze de lia 55-a naskiĝdat-reveno.

Per tenaca agitado, akcio-mendo Széchenyi kreis la financan eblecon por la subteno de Balatona vaporŝipveturado kaj ankaŭ por ties teknikaj kondiĉoj, inkluzive la konstruadon de la bezonataj havenoj.

Al la bazigo de la materiala forto de la entrepreno konsiderinde kontribuis paralele kun la pasaĝertransporto la enkonduko de la transporto de produktaĵoj kaj aliaj varoj, kies komencon jam en 1847 ebligis kargtransporta barĝo haŭlita per la ŝipo Kisfaludy kaj pretigita ankaŭ per Széchenyi.

Karakteriza estas por lia kompleksa vidmaniero, ke inter liaj pripensadoj krom la antaŭaj, oni trovas liajn opiniojn por la evoluigo de Balatona fiŝkaptado kaj de fiŝmastrumado. Kiel elokventaj pruvoj por tio servas liaj sekvaj pensoj:

„Per laŭcela modifo Balatono ne sole konservus siajn ĉiujn avantaĝojn ricevitajn donace de la naturo, ne preterlasante ĝiajn bonajn fiŝojn; sed dum tiujn kaj ĉi tiujn edukus senmezure, ĝi servus kiel nova faktoro en vico de nia evoluado nacia."

„. . . troviĝus eĉ pli multaj fiŝoj ol nun, supozante *se*, – kaj poste vere, ĉi tie la demando trafas tiun „se" – do *se* krom la rekonduko de Balatono en sian konforman lagejon samokaze ankaŭ tio efektiviĝus, kion por la arta reproduktigo de la fiŝoj oni fari povas kaj inter bone aranĝitaj cirkonstancoj fari kutimas . . ."

„. . . per fiŝlagoj laŭcele estigitaj kaj kunligitaj kun Balatono, – kiuj lagoj, kiel mi pensas ĉefe sur la bordo *(suda)* en departemento *Somogy* vere facile estus fareblaj, kaj per ili por ĉiam kaj tiom estus savebla la speciala kaj tiel bela genro de sandroj."

Atestas pri konceptoza menso de Széchenyi, ke li direktis la publikan atenton al la farendaĵoj de evoluigo de Balatonaj refreŝigejoj. Liaj vidpunktoj eksplikitaj pri futuro de Balatono kaj pri manieroj de evoluigo skizas por ni tian perspektivan programon, kiu en multaj rilatoj povas servi kiel vojmontrilo eĉ hodiaŭ.

En lia skribaĵo *„Balatona vaporŝipveturado"* ni povas legi:

„. . . je kiom utila – kaj ĉarmriĉa evoluiĝo povus kapabli la golfo de Füred *kaj ĝenerale la tuta Balatona bordregiono . . ." „. . . ĉi tie iom multe faris ja la naturo, sed despli malmulte estas rimarkebla la varta mano de l' homo, dume lia malboniga kaj missenciga direktado estas rimarkebla ĉe preskaŭ ĉiu paŝo.*

„Laborlaca homo, se ekvidas akvospegulon de Balatono, sentas novan vivhumoron plaŭdadi en siaj vejnoj . . ."

La esencon ne eblas pli bone kaj pli bele koncepti.

La supre skizitaj pripensoj kaj realigitaj celoj tute ne elĉerpas la terenon de agronomiaj konceptaĵoj kaj kreaĵoj de Széchenyi, tamen prezentas sufiĉan pruvon por ricevi imagon pri lia politika kaj ekonomia klarvido kaj energia individueco.

Longa serio de faktoj atestas, ke por la plej diversaj hidrologiaj farendaĵoj kaj por ties solvo li havis ne sole konceptojn, sed siajn pripensojn en teknika kaj ekonomia rilatoj egale organizis kaj ankaŭ direktis, ilian realigon en Vieno priluktis, la financajn rimedojn akiris per siaj konvinkaj pritraktaĵoj kaj per eluzo de siaj sociaj kunligoj.

Rajte konstatis unu el la aprezantoj de lia vivoverko, ke: *„. . . ideojn oni povas anonci per vorto kaj skribo, sed reformatoro povas iĝi la homo nur per ago. Kiam li anoncis al sia nacio neceson de iu nova kreaĵo, samokaze, se tio eblis, li mem faris ĝin . . ."*

Tial iĝis li vere granda, tial estimas lin ĉiuj, kiuj luktante por la socia evoluo, la krean laboron rigardas vera valormezurilo.

Tr. A. *Pechan*

*En la citaĵoj la tr. provas akomodiĝi al la stilo, vortordo, vortkunmetoj, ktp. de pol.-, teknikaj skribaĵoj antaŭ 150-jaraj.

PANNONIA







PANNONIA Eksterakomerca Entrepreno de UZINOJ CSEPEL

Budapest, VI., Bajza u. 26. 1062
Telegramadreso: PANEXPORT Budapest
Telefono: 228–850. Teletajpilo: 225128 PANEX–H
Poŝta adreso: Budapest, P. f. 354. 1394



•

Fajnmetalurgiaj duonfabrikaĵoj por telekomunikada tekniko, elektra kaj elektrona industrioj

•

Inkandeskaj elektrodoj kaj kablokerno por pretigo de elektrodoj de temperature regulita fandofitingo[2]

•

Ŝtaltuboj
Ŝtalboteloj por oksigeno ktp.
Bicikloj por sinjoroj, sinjorinoj kaj infanoj
Biciklo-konsistaĵoj

•

Maŝinoj por la konfekcioindustrio
– Elektraj tajladmaŝinoj
– Kudromaŝinoj
– Gladmaŝinoj
– Gladilaro
Specialaj maŝinoj kaj iliaj subtipoj

•

Maŝinoj por lavejoj kaj por la teksaĵpuriga industrio

•

Kompletaj konfekcio-instalaĵoj por teksaĵ- kaj led-konfekcio-industrioj

•

Kompletaj lavejoj kaj vestpurigejoj

•

Transportinstalaĵoj por konfekcio-fabrikoj kaj lavejoj

•

Prilabormaŝinoj por tuboj kaj stangoj
– Pintigmaŝinoj
– Tub-rektigaj, fleksaj maŝinoj
– Longigaŭtomatoj por tubo kaj stangoj

•

Spiraltub-veldejoj

•

Maŝinoj kaj uzinoj por produktato de senfugaj tuboj

•

Maŝinoj kaj uzinoj por ŝtalbotel-fabrikado

•

Maŝinoj kaj uzinoj por pretigo de arklum-veld-elektrodoj

•

Instalaĵoj kaj uzinoj por pretigi biciklo-konstruerojn, kaj por munti biciklojn

•

Konigo de Know-how[2] kaj teknologio, instrukcioj por fakpersonaro

[1] **fitingo** (PIV): kuniga interorgano (mufo, krano) de tubokondukiloj (por brulgaso, akvo); interĝustiga tubo, vaporkondukaj tuboj.

[2] **Know-how**: fabrikad-teknologio, »scii kiel«

»Maton al lingva nekompreno...!«

Kvin elstaraj sportistoj pri Esperanto

Dum la lastaj jaroj estis faritaj pluraj kampanjoj por ekuzo de Esperanto en la internacia sporta vivo. Kompreneble, tiuj kampanjoj ne povis tuj alporti plenan sukceson, tamen ili ne estis senfruktaj: ili helpis formi favoran por ni publikan opinion en sportistaj rondoj. Pruvas tion ankaŭ la suba intervju-serio, farita kun tri sovetaj kaj du hungaraj sportistoj, konataj de centmilionoj da homoj en la tuta mondo.

Estus dezirinde, ke la favora opinio, eldirita de ili, fariĝu konata por kiel eble plej multaj sportistoj en ĉiuj landoj. *Tial ni liberigas tiujn ĉi intervjuojn de ĉiaj kopirajtaj rezervoj: estas permesate aperigi ilin ĉu komplete, ĉu parte en kiu ajn lingvo.* Ni petas nur eventuale mencii la fonton, kaj laŭeble alsendi al nia redakcio ekzempleron de la periodaĵo, en kiu presiĝis tiu ĉi materialo.

La intervjuojn kun la hungaraj sportistoj faris Kálmán *Vándor,* kun la sovetaj sportistoj András *Deák.* Ili ambaŭ estas kunlaborantoj de la hungara sindikata tagĵurnalo „Népszava".

NIAJ DEMANDOJ:

1. Kion vi sentis kaj pri kio vi pensis dum la Montreal-aj olimpiaj ludoj, kiam vi deziris konversacii kaj amikiĝi kun sportkamaradoj, havantaj alian gepatran lingvon, resp. parolantaj alian fremdan lingvon nekonatan de vi, sed pro manko de komuna peranta lingvo kaj interpretisto, vi ne havis eblon pri tio?

2. Kiel vi opinias pri la antaŭaj manifestadoj de diversnaciaj olimpiaj ĉampionoj kaj sportgvidantoj, ke oni devus utiligi ankaŭ en la internacia sporta vivo la internacian lingvon Esperanton, kiu havas profundan parencecon kun la olimpia ideo kaj estas alproprigebla pli facile kaj pli rapide, ol ĉiuj aliaj fremdaj lingvoj?

3. Por enkonduki tion, ĉu ne estus dezirinde, ke la Internacia Olimpia Komitato (IOK) turnu sin al la naciaj kaj internaciaj sportaj organizaĵoj kun alvoko kaj propono ke ili organizu Esperantan lingvokurson por la sportistoj, ke la Olimpiko en Moskvo estu ne nur la nova scenejo de konkursoj, sed samtempe ankaŭ granda renkontiĝo de tiuj, kiuj jam komprenas unu la alian?

ILDIKO TORDASI, individua olimpia ĉampiono de virina rapir-skermo:

1. La kolora tumulto de la olimpiaj ludoj kvazaŭ kaŝus en si fabelmondon kaj oni ŝatus enrigardi, ekkoni ĝiajn figurojn kaj ankaŭ sin mem iomete enmeti en la magian tumulton. Sed leviĝas granda baro, ke ne ekzistas komuna lingvo, per kiu ni ĉiuj komprenus unu la alian. Vere, parto de la junuloj hodiaŭ jam parolas iel-tiel unu-du lingvojn, tamen helpe de tio nia vorto ankoraŭ ne povas atingi ĉiujn orelojn. Ekzemple, mi estus ŝatinta multe paroli kun la japanaj knabinoj, Azio ĉiam ekscitis min . . . Se ni havus komunan olimpian lingvon, tio povus multe helpi.

2. Mi treege konsentas la iniciatojn de tiuj, kiuj ŝatus utiligi E-n ankaŭ en la internacia sporta vivo, ĉar estas eksterordinare facile alproprigi ĝin, ja ĝi estas vivanta internacia lingvo, evoluigita el naciaj lingvoj, kvazaŭ nuntempa latino, kaj ankaŭ ĝia muziko estas orelkaresa.

3. Estus tre bone, se IOK akcelus ĝin kaj oni aranĝus E-lingvokursojn jam antaŭ la olimpiaj ludoj de Moskvo por la olimpiaj konkursantoj, ĉar tiamaniere ni farus gravan paŝon por la interkompreniĝo homa en la internacia sporta vivo. Miaflanke mi subtenus ĉi tiun iniciaton.



ZOLTÁN MAGYAR, la olimpia kaj mondĉampiono de gimnastiko kaj surĉevala svingo

1. La gimnastiko estas sporto en kiu oni ne bezonas multe paroli. Sufiĉas nur agi kaj el tio ni ĉiuj komprenas. Tiom pli interesus nin ĉiujn, kion niaj eksterlandaj sportkamaradoj faras dum labortagoj, kiel kaj kiom ili trejnas sin, kiom ili laboras por perfektigi iun movon. Pri tio oni povus paroli multe. Sed estas bedaŭrinde, la nunajn olimpiajn lingvojn ni ne same konas kaj pro tio plej ofte ni perdas la emon de tiuj ideoŝangoj. Mi jam multfoje pensis pri tio, ke en la kadro de la paca kunvivado ĉiuj povus penadi ankaŭ pri la enkonduko de komuna mondolingvo, kiuj tiurilate estas necese fakspertaj, kaj la estroj de la ŝtatoj, kiuj devus konsideri ankaŭ tion sia tasko.

2. IOK povus multe fari por konvena utiligo de Eo en la internacia sporta vivo. Per tio ĝi montrus bonan ekzemplon por la mondo, ĉar ĝi kiel unua enkondukus la komunan lingvon sur vasta internacia tereno, en la sporta vivo. Ankaŭ mi estus subtenanto de tiu grandioza afero, ĉar mi jam multfoje aŭdis pri similaj iniciatoj kaj imagoj. Estus jam tre dezirinde, ke la sporta mondo kaj IOK apogu la internacian lingvon.

3. Se ĉiuj naciaj olimpiaj komitatoj de la landoj kaj ĉiuj naciaj, internaciaj sport-organizaĵoj montrus ekzemplon per tia kunagordita iniciato, tio rezultigus certan sukceson en la rondo de la sportistoj. Por tio necesus nur, ke oni organizu kaj ankaŭ stimulu la instruadon, lernadon de la internacia lingvo. Se tiaj kursoj ekfunkcios, mi inter la unuaj anoncos min, kaj mi ĝojus, se ankaŭ miaj eksterlandaj konkurskamaradoj farus same. Ni povus paroli pri multaj aferoj, pri kiuj ĝis nun ni ne komprenis unu la alian. La olimpiaj ludoj en Moskvo estus bona okazo por tio, ke ankaŭ Esperanto aperu sur la „podio".

GALINA PROZUMENŜĈIKOVA, naĝistino, olimpia ĉampionino, merita sportistino de Sovetio

● 1. En Montreal mi sentis la samon, kion la plimulto de la homoj sentas, se oni alvenas en tian landon, kies lingvon oni ne konas. Tamen, ni sportistoj, vizitantaj dum unu jaro ĉ. 10–15 landojn, eble ni sentas pli gravaj la lingvajn malfacilaĵojn, ol la ĉiutagaj homoj. Ja, dum la unua vizito por multaj gravas nur la konatiĝo kun la naturaj belaĵoj, resp. konatiĝo kun la artobjektoj kaj kun la lando mem. Sed kiu vizitadas la saman landon jam la dekan fojon, tiu ŝatus konatiĝi ĉefe kun la homoj. Kaj tio ja nur per gestikulado mana-pieda ne estas ebla. Kiomfoje jam ankaŭ mi bedaŭris, ke en mia junaĝo mi ne ellernis almenaŭ unu mondolingvon. Vere, ankaŭ per tio kion mi atingus . . .? Ĉar, mi konkursas unu tagon en Nederlando, alian tagon en Usono, baldaŭ eble en Japanio kaj oni ne povas ellerni ĉiujn lingvojn. Tial mi proponas al la sportistoj ankoraŭ junaj, ke vere estas inde amikiĝi kun Esperanto. Despli, ĉar la internaciaj kontaktoj en la sporto pliiĝas de jaro al jaro.

● 2. Estas bone scii, ke la olimpiaj sportistoj, sportestroj, apartenantaj al la plej diversaj nacioj – kiel el iliaj deklaroj evidentiĝas – jam ankaŭ rekonis la gravecon de la internacia lingvo. Do, mi ĝojas, ke ne nur mi pensas tiel . . .

● 3. Laŭ mia opinio IOK farus tre bone, se ĝi proponus la lernadon de la Esperanto pere de la olimpiaj komitatoj de la diversaj landoj, kaj ankaŭ organizus por ili fakultativan instruadon. Tio vere helpus la disvolviĝon de la olimpia ideo kaj povus signifi konsiderindan antaŭenpaŝon koncerne la konstruadon de niaj homaj, resp. sportkamaradaj kontaktoj.

ANATOLIJ KARPOV, ŝakisto, internacia grandmajstro, mondĉampiono

● 1. Kvankam la Montreal-an olimpikon mi ne partoprenis – ja estas konate, ke ŝakistoj havas apartan olimpikon – la menciita demando okupas ofte ankaŭ min. Mi tre ofte vizitas diversajn regionojn de la mondo, pro tio mi ofte baraktadas kun la lingvaj malfacilaĵoj. Tiujn okazojn kelkfoje ni provas trakti bonhumore, sed vere estas tre malgaje, ke tia neebla situacio elformiĝis. Feliĉe, krom mia gepatra lingvo mi bone parolas angle kaj ankaŭ germane, tamen ankaŭ tiel ni luktas kun niaj eksterlandaj partneroj pro la reciproka nekompreno, precipe en Sud-Ameriko. Vere, ĉiam troviĝas interpretisto en la proksimo, tiel mi povas eviti ĝenajn situaciojn, tamen mi pensas, ke ne tio estas la vera solvo.

● 2. Mi ĝoje akceptis ĉi tiujn deklarojn, ĉar ankaŭ mi samopinias. Mi jam aŭdis multe kaj bone pri Esperanto; samtempe mi konas, spertas el vivproksimo la lingvan nekomprenon de la sporta mondo, kaj la zorgojn, kiuj sekvas el ĝi. Tiuj du faktoj instigas min pri tio, ke havante okazon, mi subtenu la internacian lingvon. Tion mi diras malgraŭ tio, ke mi parolas tri mondlingvojn.

● 3. Tia alvoko estas ne nur dezirinda, sed eksplicite necesa. Pluraj el la naciaj olimpiaj komitatoj jam simpatias kun la afero, nur ĝuste neniu kuraĝas oficiale prezenti ĉi tiun temon al IOK, ĉar la naciaj komitatoj timas, ke ili restos minoritate. Sekve de la eventuala alvoko de IOK la situacio certe radikale ŝanĝiĝus. Tio instigus serioze la plej multajn naciajn olimpiajn komitatojn por organizi la instruadon de E, kaj la sportistojn por la amasa lernado. Mi pensas, ke la propono de IOK – parolante ŝaklingve – fine povus elmovi la aferon de E el la ĝisnuna „pat-situacio" kaj povus certigi bonan bazon por tio, ke dum la sekvaj jaroj ni ĉiam pli ofte povu doni „maton" al la lingva nekompreno inter sportistoj.

Trad. István *László*

AAVO PIKKUUS, olimpia biciklisto, merita sportisto de Sovetio

● 1. La manko de komuna, peranta lingvo kaŭzas grandan zorgon, problemon kaj ĉagrenon ne nur ĉiuj kvaran jaron, dum la olimpiaj ludoj, sed kvazaŭ ĉiun monaton. Ni vojaĝas multege al diversaj konkursoj kaj ankaŭ al ni ofte alvenas eksterlandaj sportistoj. Mi mem estas eston-devena kaj nian lingvon konas tre malmultaj, ja ellerni ĝin estas tre malfacile. La lingvoj, apartenantaj al la finn-ugra lingvo-familio ĝenerale estas tre komplikaj, do malmultaj povas aĉeti al mi la „pasporton" de la kompreno. Tiel ni devus ellerni la tielnomatajn mondolingvojn. Sed tio estas preskaŭ neebla: inter la multegaj trejniĝoj, konkursoj jam ankaŭ nun ni apenaŭ havas liberan tempon. Kaj cetere: por ellerni unu mondolingvon, necesas almenaŭ kvinses jaroj kaj per ĝi ni povus atingi interkompreniĝon nur en kelkaj landoj. Alie la afero statas kun la de ĉiu konata, facila Esperanto. Se oni ĉie utiligus kaj institucie instruus ĝin, tiam ni povus kompreni unu la alian en ĉiu parto de la mondo.

● 2. Eble jam miaj antaŭaj vortoj spegulas, ke mi legis plezure tiujn manifestaĵojn. Tiom pli, ke mi jam provis proponi inter miaj estonaj sportkamaradoj: ni okupiĝu pri Esperanto. Ja, por la rezulto ni bezonus ankaŭ la subtenon de sportaj institucioj, ĉar tiamaniere ni havus garantion pri tio, ke estas inde ellerni ĉi tiun lingvon, kaj ni povus utiligi ĝin ĉie.

● 3. Mi tute konsentas tiun penson. La olimpiaj ludoj en Moskvo estus bonega okazo por tio, ke oni jam antaŭe organizu Esperantajn lingvokursojn dise en la mondo. Mi estas certa pri tio, ke la konsiderinda plimulto de la sportistoj akceptus ĝoje tiucelan alvokon de IOK.

Dum ekskurso,
ĉe sporto

en teo,

en limonado

Kun detalaj informoj ni estas je dispono de niaj klientoj
MIKÖV 1025, Budapest, XX., Nyári Pál u. 88. Pf. 75.
Telefon: 176–716, 573–088

Norvego

fariĝinta hungara nobelo

Centjara datreveno de trista evento, la granda inundo ruiniginta la urbon *Szeged,* faris aktuala rememoron pri homo, atentinda figuro de la hungara socio en la 19-a jc.

Antaŭ ol paroli pri la vivo-verko de *Gregersen,* oni devas reiri al la j. 1847. Tiam venis al Hungario Guilbrand *Gregersen,* 23-jara ĉarpentisto kaj dungiĝis ĉe fervojkonstrua entrepreno. Post mallonga tempo, en la j. 1848. eksplodis la hungara liberbatalo kontraŭ la Habsburg-regado. *Gregersen* senhezite aliĝis al la hungara armeo, kie li deĵoris kiel sapeisto kaj – per siaj teĥnikaj konoj li plenumis valoran militservon. En la j. 1849 la rusa armeo venkis la hungarajn taĉmentojn en Sud-Hungario. La liberbatalo falis, malmultaj hungaraj soldatoj – inter ili *Gregersen* – sukcesis savi sin, eviti la militkaptitecon. Post danĝerplena vagado *Gregersen* atingis la ĉefurbon *Pest,* kie li ekhavis postenon ĉe la itala fervojkonstrua firmao *Talagini.*

Dum la periodo 1850–1865 *Gregersen* laboris – kiel ĉefa intendanto kaj laborestro de la menciita itala firmao – kaj konstruis aron da pontoj kaj fervojoj (trakoj, domoj, riparejoj) en diversaj lokoj de Hungario, Italio kaj Aŭstrio. Sekve de tiu sukcesplena agado, rekono de la fakuloj al *Gregersen* daŭre kreskis – oni nomis lin „specialisto de ponto-konstruado".

Intertempe – en la j. 1850 – *Gregersen* decidis loĝiĝi definitive en Hungario, kaj baldaŭ li fondis familion.

En la j. 1865 *Gregersen* aĉetis grandan ligna ĵindustrian uzinon en *Pest,* kaj memstarigis sin. Ekde tiu tempo ĝis morto la agadsfero de la Gregersen-uzino rapide evoluis kaj – krom la pontoj kaj fervojoj – etendiĝis al la konstruado de publikaj loĝdomoj, ĝetoj, digoj, eĉ tuneloj (ekz. en Budapeŝto sub la monto Várhegy).

La 12-an de marto en la j. 1879 la rivero *Tisza* inundis kaj ruinigis *Szeged,* la plej grandan provincan urbon de Hungario. La inundo faris teruran pereigon, detruiĝis 5666 loĝdomoj (nur 334 restis sendifektaj), mortis 151 personoj kaj pli ol 70 000 homoj senhejmiĝis. Tiu natura bato vekis ĝeneralan konsterniĝon ne nur en Hungario, sed en tuta Eŭropo.

Post retiriĝo de la akvo evidentiĝis larĝskala solidareco al Szeged flanke de hungaraj kaj pluraj Eŭropaj urboj. Por helpi la rekonstruon, komenciĝis multflankaj financaj kaj materialaj kontribuoj de la registaro, oficialaj instancoj kaj de multaj individuoj. Inter la helpemuloj troviĝis ankaŭ *Gregersen,* kiu aktive partoprenis la konstruadon de nova digo ĉirkaŭ Szeged, konstruis la kanalizadon kaj fundamentojn de la nova ponto. Krom la menciitaj kontribuoj *Gregersen* prezentis ekzemplodonan iniciaton, nome per propra kapitalo li konstruigis 40 loĝdomojn por malriĉaj familioj perdintaj siajn havaĵojn pro la inundo.

Senĉesa agado, entreprenemo kaj multaj konstru-verkoj ligiĝas al la vivo de *Gregersen.* Tiuj meritoj portis al li ĝeneralan estimon kaj rekonon, tio evidentiĝis ankaŭ de la plej alta loko, kiam la reĝo honorigis *Gregersen* per la ordeno de Kavalira Kruco de la Ordeno Francisko-Jozefo. Kulminis la rekono al *Gregersen,* kiam post la rekonstruo de Szeged – en la j. 1885 – ricevis *Gregersen* nobelecon, kaj de tiu tempo li portis la nomon Guilbrand *Ságy Gregersen.*

Tiel la norvega enmigrinto fariĝis hungara nobelo.

Dum la dua mondmilito pereis multaj verkoj de *Gregersen,* atestintaj lian genion, postrestis nur flaviĝintaj fotoj kaj la tombo en la Kerepesi-tombejo (Budapeŝto), por rememorigi la vivantojn pri Guilbrand *Ságy Gregersen,* naskito de Norvegio, ripozanta en la hungara tero.

Lajos *Kapitány*

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

Okaze de la Internacia Jaro de la Infano, Hungara Esperanto-Asocio eldonis plurajn porinfanajn verkojn. La ĉi-subaj demandoj estas ĉerpitaj el la poemareto *Hund-bazaro* kaj el la libro *Hungaraj fabeloj.* Por partopreni en la lotumado de libropremioj, oni bezonas ĝuste respondi *du* el la tri demandoj.

1. Kiu verkis originale, kaj kiu tradukis en Esperanton la poemon *Tri leporoj?*

2. El kiu poemo estas citita la suba strofo?

En okuloj
vi – la suno
ho, ne portu for!
Se vi irus,
ĉio grizus
ronde sen kolor'.

3. Kiom da mono elspezis la heroo de unu el la fabeloj por arĝenta glaso?

La solvojn oni alsendu ĝis la 15-a de septembro.

recenzoj - recenzoj - recenzoj

Bona traduko de pola klasikaĵo

Tra dezerto kaj praarbaro. Romano de Henryk Sienkiewicz. El la pola lingvo tradukis: Mieczyslaw Sygnarski. Eldonejo Interpress, Varsovio (kunlabore kun Heroldo de Esperanto), 1978. 315 p., 21 cm. Prezo: 24,– ned. gld. (Por Hungario 110,– Ft.)

Verkoj de polaj romantismaj aŭtoroj estas tre familiaraj por la esperantistaj legantoj, ja antaŭ sep jardekoj ĝuste tia verko, *La Faraono* de Boleslaw *Prus* estis la unua esperantlingva libro, kiu rikoltis veran sukceson ĉe la publiko. Jam ankaŭ la nomo de *Sienkiewicz* estas konata al la esperantistoj, unuavice per la verko *Quo vadis?*, kiu populariĝis en la traduko de Lidia *Zamenhof*.

Tra dezerto kaj praarbaro verŝajne antaŭvidas saman sukceson, ja temas pri romano katene interesa, majstre konstruita, en kiu rolas tre memorindaj figuroj.

La plej memorindaj estas certe la du protagonistoj: la brava pola junulo Staĉjo, kaj la angla knabineto Nel. Ili estas forrabitaj en Egiptio dum la okdekaj jaroj de la pasinta jarcento, kiam okazas en Sudano la ribelo de Mahdi. Ili trapasas sennombrajn aventurojn en la dezerto kaj praarbaro: por saviĝi ili bezonas ĉiujn siajn lerton kaj kuraĝon, kiel foje-foje ankaŭ la favoran ŝanĝiĝon de la cirkonstancoj. La suferojn kaj luktadon por la vivo iam kaj tiam spicas humanisme agorditaj, preskaŭ idiliaj epizodoj (ekz. pri savo de elefanto), kiuj tamen formas integran parton de la tuta historio.



La agado estas tiel riĉa kaj varia, ke eĉ skize estas maleble konigi ĝin ĉi tie. Aĉetontoj de tiu ĉi verko certe akiros por si tre agrablajn – nepre sen-enuajn – leghorojn, al kio certe multe kontribuas ankaŭ la tre bona traduko de *Sygnarski*. La eldonejo afable aldonis koloran mapon pri la loko de la agado, kaj la legantoj tiamaniere povas precize sekvi la vojon de Staĉjo kaj Nel „tra dezerto kaj praarbaro".

Poemoj por infanoj

Poezia Bukedo Por Geknaboj de la Mondo de Bertram Potts. Eldonis: Amo-Akademio (Japanujo), 1978. Enkonduko de Marjorie Boulton. Kun (pluraj koloraj) ilustraĵoj. 102 p., 18 cm., Prezo: 10,– ned. gld.

En la Katalogo de la Libroservo de UEA sub la titolo *Por infanoj (kaj komencantoj)* estas listigitaj entute 54 eroj. Post pli atenta ekzamenado tamen facile evidentiĝas, ke maksimume duono de tiuj libroj enhavas vere porinfanan literaturon. Eĉ pli magra estas la rikolto, se oni serĉas originalaĵojn en tiu rubriko. Tial estas nun agrablege teni en la manoj plaĉan volumeton kun 49 aŭtentikaj porinfanaj poemoj, el la plumo de la nov-zelanda verkisto Bertram *Potts*. Li debutis en la jaro 1971 kun la grandsukcesa novelaro *Nokto da timo*, kiu tamen tute ne konjektigis, ke la aŭtoro iam verkos ankaŭ por infanoj.

Antaŭ ol trovi vortojn por pli nuancita priskribo, mi devas diri, ke tiuj poemoj estas *bonegaj*. Potts – homo jam aĝa – kapablas trovi la ton-ondon de infanoj, kiel vera saĝa avo, kiu jam forskuis de si la gravmienadon de la „aktivaj" plenkreskuloj, sciante, ke kariero, mono, nova aŭtomobilo, ambicioj – estas nur vantaĵo. Tamen, li ne simple reinfaniĝas, sed – konservante sian vivosaĝon – rehavas la kapablon kompreni kaj preni serioze la mirmondon de la infanoj.

Signifa parto de la poemoj estas verkita ne nur por infanoj, sed ankaŭ *pri* infanoj. En tiuj poemoj li ne priskribas la infanojn de ekstere, sed monologe paroligas infanon mem. (*Mi ne volas ellitiĝi!, Mi legas en la lito, La bonkonduta infano* ktp.)

En aliaj poemoj aperas elfoj, koboldoj, amindaj bestoj, neĝhomo kaj aliaj protagonistoj de la infanaj fantazio kaj pensado. Ĉiuj tiuj figuroj aperas freŝe, sen ia balasto, kion plenkreskuloj povus atribui al tiuj amindaĵoj. (Eble nur en *La senfolia arbo* senteblas io tia.)

Ĉiu poemo legiĝas facile, kun orelkaresaj ritmoj kaj rimoj. Sprito kaj bonhumoro ankaŭ estas konstanta garnaĵo, de la poemoj, ne nur enhave, sed ankaŭ forme. Jen kiel fanfaronas „bonkonduta infano":

Manĝaĵon mi tre zorge maĉas,
neniam klaĉas kaj ne kraĉas . . .

Kaj kiel aspektas kaj kion faras elfo:

Li estis alta nur maturan fragon . . .
. . . . . .
Li suprenĵetis ŝtonon kaj ĝin kaptis,
faligis roson kaj insektojn baptis . . .

La specimenoj malkaŝas, ke Potts ne reduktas la leksikon de la poemoj. Tamen, mi ne timas, ke tio kaŭzos malfacilaĵojn: tre probable la muzikeco kaj vigla ritmo de la versoj emigos la infanojn ellerni la nekonatajn vortojn.

V. Benczik

recenzoj - recenzoj - recenzoj



Konjako en akvo

Retoj. Originala romano de Lorjak. Eldonis: Fondumo Esperanto, Helsinki, 1978. 207 p., 18 cm. Prezo: 20,– ned. gld.

Antaŭ kelkaj jaroj mi estis entuziasma salutanto de *Neologisme*, la unua romano de la aŭtoro. De lia dua verko – *Transe* – mi estis foravertita, kaj verŝajne prave, ĉar kolegino kutime flegma verkis pri ĝi por HV recenzon indigne malaproban: ŝi trovis la verkon tro senbrida. Kiam la poŝto alportis *Retoj*-n, estante ege elĉerpita pro akumuliĝo de diversaj laboroj, mi avide kaptis ĝin, pensante: nun mi bezonas ĝuste ion *senbridan*. Sen prokrasto mi eklegis la romanon.

Sed vane mi serĉis la senbridecon, kiu dece vigligus min. *Retoj* montriĝis simple teda. Ĝi estas humura detektiva verko, utiliganta sufiĉe konatajn figurojn kaj situaciojn. Tamen, tio en si mem ne multe ĝenus, ja estas tre malfacile eltrovi ion novan sur tiu ĉi literatura kampo, karakterizata de amasa produktado. Ĝenis min la fakto, ke la ne tre fortimpresan historion Lorjak senfine longigas: se li priverkus ĝin sur ĉ. 80–100 paĝoj, eble ĝi fariĝus leginda detektivaĵo. Sed en sia nuna formo ĝi ĝueblas nur kiel kvindek gramoj da mezkvalita konjako, verŝita en duonlitron da akvo.

Bedaŭrinde, la aventuroj de la juna Pariza komizeto, fariĝinta riĉa grafo Altamont, ne povis impresi min, tiom pli kelkaj ĝenaj etaĵoj en la historio (kiun tamen mi ne volas rakonti ĉi tie, ja temas pri detektivaĵo), el kiuj mi menciu nur unu. En kriza situacio Prosper Totinet, aŭtoro de policromanoj (!), devas longe serĉi krajonon por noti ciferon de aŭtomobilo, kies pasaĝeroj faras ion vere tre malbelan. Kaj jen la surprizo: la cifero de la koncerna aŭtomobilo estis *3000 RD* . . . (Antaŭ du tagoj mi finis la legadon de la romano, kaj je la barbo de Zamenhof, mi skribas ĉi tie la ciferon laŭ memoro, kvankam ĝenerale bona memorkapablo ne troviĝas inter miaj virtoj.)

Ne kontribuas al la allogeco de la libro ankaŭ la fakto, ke ĝi estas tajpita – kvankam kun rektigita dekstra flanko – per ordinara tajpilo. Kaj la prezo de 20 guldenoj estas ekstreme alta . . .

Valora literatura gvidilo

Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto de William Auld. Enkonduka eseo kaj bibliografio de Reinhard Haupenthal. Eldonis: Artur E. Iltis, Saarbrücken, 1979. 101 p., 20 cm. Prezo: 12,– ned. gld. (Por Hungario: 110,– Ft)

La kulturaj semajnfinoj, organizataj de Sarlanda Esperanto-Ligo, dum la lastaj jaroj akiris signifan reputacion. Tiu aranĝo celas efike disvastigi la propre Esperantan kulturon inter esperantistoj, ĉar kiel skribas *Haupenthal* en la enkonduko – „eĉ longjaraj esperantistoj estas kulture (mi parolas pri nia Esperanta kulturo) treege subevoluintaj". Tiu ĉi libro enhavas la prelegserion, faritan de *Auld* dum 1977, en unu el la kulturaj semajnfinoj.

La originala literaturo estas sendube la plej signifa parto de la propre Esperanta kulturo, kaj ĝia studado estas aparte grava por ĉiuj, kiuj konsideras nian lingvon ne simple ilo de poŝtmark-interŝanĝoj. Tian studadon tamen grave malhelpas manko de sinteza literaturhistorio, tial estas aparte bonvena tiu ĉi skiza sed nepre direktodona kaj informa superrigardo fare de la konata skota literaturisto.

Kompreneble en verko tiel konciza oni ne povas atendi multajn novaĵojn, ĝi servas unuavice tiujn homojn, kiuj bezonas „en-kondukon" en nian literaturon. Tamen, ankaŭ por regulaj legantoj de la originala beletro donas multajn informojn kaj novajn vidpunktojn la unua ĉapitro, kiu ekzamenas la rolon de la originala literaturo en la historio de Esperanto. Auld ĉi tie tuŝas la demandon de la emocia rilato al la lingvo, kaj tiu idearo, kiu naskis la lingvon; eĉ nuntempe multaj simple neas aŭ akre vipadas tian emocian rilaton. Lige kun tio li citas longan fragmenton el letero de A. *Gode*, inventinto de Interlingua: tiu citaĵo tre trafe prilumas la diferencon inter esperantistoj kaj adeptoj de aliaj planlingvoj, kaj, sendube, Esperanto ŝuldas sian relativan disvastiĝintecon ĝuste al tiu diferenco.

Kvar prelegoj pritraktas la evoluhistorion de la Esperanta literaturo, kompreneble, sen pretendo al kompleteco. Sekvas el la karaktero de la materialo, ke la konstatoj, prijuĝoj koncerne la unuajn periodojn estas pli firmaj kaj validaj, dum la prezento de la lastaj jardekoj ŝajnas pli skiza, kaj ĝi ofte reduktiĝas je citaĵo el eseo pri la koncerna verkisto. Tamen, pri la esenco oni povas esti kontenta: Auld sukcesis „tuŝi la ĉefpintojn kaj indiki la ĉefvojon" de nia literaturo, kaj tiasence lia verko estas ne nur valora literaturpopularigo, sed ankaŭ atentinda fonto por verkota sinteza Esperanta literaturhistorio.

Urboperlo en Nordo

La antikva Rigo. El la latva lingvo tradukis: Ed. Jaunvalks. Eldonis: Eldonejo „Liesma", Rigo, 1978. 48 p., 15 X 16,5 cm. Prezo: 3,– ned. gld. (Por Hungario: 15,– forintoj.)

Mi ne scias, kiom da nelatvoj havas ioman imagon pri la belaĵoj de la urbo Rigo: mi mem devas konfesi, ke tiu ĉi lerte redaktita, bone tradukita kaj teknike tre plaĉa libreto portis por mi la unuajn detalajn informojn pri la Latvia ĉefurbo.

La antikva Rigo konigas la historion de la urbo, kaj donas fakspertajn klarigojn pri la vidindaĵoj de tiu ĉi nekonata perlo de Nordo. Multe substrekas la konvinkan forton de la priskriboj ankaŭ la artaj kaj bonkvalite presitaj kolorfotoj.

Kiu tralegos tiun ĉi libreton, certe ne povos longe kontraŭstari la tenton viziti la ĉefurbon de la Latvia SSR.

V. *Benczik*

recenzoj - recenzoj - recenzoj



Nova talento el Italio

La turoj de l' ĉefurbo. Originalaj verkoj de Mauro Nervi. Antaŭparolo de Aldo de' Giorgi. Eldonis: Esperantaj Kajeroj, Manĉestro, 1978. 119 p., 21 cm. Prezo: 10,80 ned. gld.

Mauro *Nervi* estas nepre unu el la plej junaj kreantoj de la Esperanta literaturo: li naskigis en la jaro 1958. *La turoj de l' ĉefurbo* estas lia unua libro, surprizonta la legantojn certe unuavice per sia *matureco*. La volumon malfermas ŝvebe nostalgiaj poemoj, etikeditaj *kanzonoj*. Mi ne scias, ĉu ili jam estas muzikigitaj: certe ili sonus tre agrable kun gitara akompano.

La kanzonojn sekvas noveloj, entute kvar, inter kiuj elstaras la sprite grimaca *Tertremo* kaj *1977: klarigaj piednotoj*. La ĉi lasta verko estas konsterna ĉeno de scenoj, esprimantaj doloran senesperon pri la mondo. Ĝi estas majstre redaktita, efikas tute sincere kaj konvinke, tamen iel mi flaras en ĝi ankaŭ dozeton de junula 'mondmalŝata pozemo. Ĉiukaze, mi devas diri, ke *ĉiuj kvar noveloj* grave superas la kutiman nivelon de nia originala prozo.

Malgraŭ la sukcesaj prozaĵoj, mi trovas ke Nervi estas antaŭ ĉio poeto. Aperas en la volumo 32 poemoj, kaj certe ĉiuj konsentos, ke troviĝas inter ili nek unu malbona peco.

La tuto estas kvazaŭ konscia lukto kontraŭ la „parnasisma tento". Nervi volas antaŭ ĉio

. . . progresi kaj la vortojn pesi,
por ke kutiman stilon ni transsaltu.

Interese, ke li volas „transsalti" parnasismon; tion atestas ankaŭ la poemo *Al Kalocsay*. Ĉu li entute ne rimarkis, ke post Kalocsay aperis poezioj pli modernaj, kiel tiu de *Auld, Ragnarsson, De Kock, Sadler, Goodheir?* Ja *De Kock* mem jam verkis tiusencan poemon al Kalocsay. Ĉu Nervi trovas, ke tiuj poezioj tamen restis troe ligitaj al la intermilitaj tradicioj, aŭ li havas dubojn pri tio, ĉu ili povis meti firmajn radikojn en la publika gusto? Aŭ simple *li mem* estas emocie ligita al tio, kion li nomas parnasismo? Pecoj, kiel *Ankoraŭ sonoras via prakanto* permesas konkludi pri io tia. Lia poetiko tamen estas esence realisma:

. . . fiksrigardu l' asfaltitan vojon
de l' efektivo, kiu daŭre pledas
por pli homeca vivo . . .

Ĉiukaze, el tiu strebo „transsalti" parnasismon rezultas tre bona poezio. Poemoj forme tre puritanaj, disciplinemaj, sin koncentrantaj ĉiam al la kerna penso. Sed ĉio ĉi efektiviĝas per poezia lingvaĵo ege densa, abunde garnita per nekutimaj epitetoj kaj figuroj, kiel *geometria kompato, suno ĉe l' zenito skrapas la kalkan muron, krispigu la akvon de l' menso* ktp.

La volumon fermas du teatraĵoj en versoj: *Klitemnestra* kaj *Parabole*. El ili nepre pli atentindas la lasta, kiu lanĉas tre profundan filozofian emon per versoj impone koncizaj kaj trafaj. Tamen, por mi *Parabole* montriĝis troe teatraĵo por tutece percepti ĝin per nura lego, sed mi timas, ke sur scenejo ĝi montriĝos tro poezia. Ĉiukaze, tiu demando povos decidiĝi nur sursceneje.

Estas sendube, ke nia literaturo riĉiĝis per nova vera talento. Jam per tiu ĉi sola volumo li nepre viciĝis inter la dek plej bonajn kulturantojn de la Internacia Lingvo: se li kapablos plupaŝi, certe baldaŭ li fariĝos unu el niaj veraj granduloj.

V. *Benczik*

Korespondi deziras

Kun gedancistoj, prefere klasikaj: Detlef Kaspar *Mainz* (18) balet-studento. GDR–701, *Leipzig* Shakespeare Str. 60. – S-ro Alberto Mario *Pozzali* (33), E-diplomito, *Milano*, I–20127 via Natale Battaglia 29. – F-ino Elzbieta *Adamiec* (23) komercistino, pri turismo, muziko, fremdlingvoj. PL–10–449 *Olsztyn*, str. Zwycięstwa 69/80. – S-ino Nenka *Zjubenova* (30) ekonomiistino, laboras en sindikata kulturdomo, BG–5400, *Sevlievo* urbo, str. M. Kliment 14. – Mieczyslaw *Nowak* (40) oficisto, pri muziko, liter., agrikulturo, k.a. certe respondas. PL–56–512 *Bukowina Syc.* 9.– Vladimir *Volkov*, SU–454007 *Ĉeljabinsk*, I Pjatiletka 33–33. – Dariusz *Jasinski* (17) muziko, arto, PL–08–400 *Garvolino* str. Nawodna 29. – Bozena *Kuzma*, kulturo, muziko, PL–08–400 *Garvolino*, str. Senatorska 5/25. – Bozena *Jeziorek* (17) arto, scienco, PL–08–470 *Wilga*, Zakrzew 33. – Halina *Kordas* (17) kulturo, arto, certe respondas, PL–08–420 *Miastkow* Oziemkowka 45. – Mezlernejaj lernantinoj el urbo *Sevlievo* BG–5400; Marija *Marinova*, str. Rosica 32. – Tatjana *Nedelĉeva*, str. Mara Gidik 42.– Marija *Boteva*, str. Balvanka bitka 8. – Bistra *Spasova*, str. Edelvajs 1. – Eleonora *Stejnova*, str. Vidima 2. – Ivanička *Ivanova*, str. Kiril k Metodi 31. – Estonaj kursanoj, junaj (11–17) kaj plenkreskuloj (18–40) ktm. pĉt. interŝanĝi pk. kaj pm. Nepre respondas! Kursgvidanto, UEA-delegito A. *Mikk* SU–202 900 *Viljandi*, str. Kauge 30–35.

Porinfana literaturo

En la nuna krucenigmo ni kaŝis titolon de porinfanaj verkoj. Alsendi sufiĉas la horizontalajn 1. kaj 92., la vertikalajn 54. kaj 58. Inter la solvintoj ni lotumos premiojn.(Adreso: Redakcio de Hungara Vivo, Budapest, Pf. 193., H-1368).

Horizontale: 1. *Ĉi tiu kolektaĵo de tradukitaj poemoj aperos ĉe Hungara Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Jaro de Infanoj.* 15. Disfamigeco de nomo 16. Amase 17. Verkiva 18. Pola lancisto 19. Peni ne fari 21. Sengepatraj 22. Frukto de tomato, ribo 23.Arbo kun grandaj folioj 25. Tio faras kun vefto teksaĵon (R) 26. Faro 27. Doni ion al iu (R) 28. En vortkunmetoj: interna 30. En geografiaj nomoj: rivero 31. Superhoma estaĵo (R) 32. Batalantaro 34. Logejo el tolaĵo 36. Subjunkcio 37. Amantino de Tezeo 39. Maloftaĵo (-o) 41. Nepo de franca reĝo Karolo la Granda (R) 43. Aŭtoj el Togo kaj Kambogo 45. Kompatinda stato 47. Epiteto de juvelŝtono 48. Tia verko imitas karakterizaĵojn de iu verkisto 50. Ano de mongoloida gento vivanta en Tajlando (R) 51. Adverbo 52. Riparis la subakvan parton de ŝipo. 53. Vesto (R) 54. Tio trovigas inter la opaj landoj (R) 55. Havis malmoligintan haŭton 56. Stroncio 57. Aervibradoj 59. Alproprigi por kaŭzi al aliaj malutilon (R) 61. Nomo de multaj papoj, sed miksite! 62. Voĉdonu 63. Kartludo (R) 65. Tiaj kapricoj estas multkoloraj! 67. Aŭtosimboloj el Hispanujo kaj Aŭstrio 69. Parto de vorto (R) 71. Imagaĵo (R) 72. Iama sundio en Egiptujo 73. Prefikso 75. Giajn selfibrojn oni uzas por teksaĵo (R) 77. Astrologo ĉe la helenoj (R) 78. Edzino de Urano 79. Ne ĉiutaga 81. Malgranda krustulo (R) 83. Tirane traktadi (R) 84. Abrupte havi koran inklinon al iu 86. Lignospeco (R) 87. Kaposto (R) 88. Kriplulo 90. Monto apud Trojo 91. Kreskaĵo utiligata kiel legomo (R) 92. *La titolo de nova bildrakonto aperonta ĉe HEA*

Vertikale: 1. Mezepoka kantisto 2. Fini kaj denove komenci la libron 3. Ĉirkaŭ la duono de la homaro 4. Havigo 5. Inklino 6. Duobligite: korta birdo! 7. Admiriga 8. Kolerigi 9. Tiu kiu deziras ricevi ion (-o) 10. Roko! 11. Ŝango de loko 12. Sensaĵkondukilo (R) 13. Aĉa ago (-o) 14. Estis tro ŝparema 19. Verbo de kelkaj kunsidoj 20. Prepozicio 23. Kosmetika smiraĵo (R) 24. Beligis 27. Rivero en Jugoslavio 29. Epiteto de maro inter Eŭropo kaj Afriko 32. Lago en la Soveta Unio 33. Ŝtato en Usono 35. Verda insulo en la dezerto (R) 37. Avertata pri danĝero (-a) 38. Epiteto de tiu, kiu atakas la unua (R) 40. Disketoj 42. Parto de fiziko (R) 44. Politika komploto (R) 46. Glatigi lignon (R) 48. Blanketa (R) 49. Komuniki (R) 52. Kantas ĝojan religiecan popolkanton53. La aktoro agas 54. *Belega libro de Béla Balázs* 55. Gento de melonarbo (R) 57. Restarigi la normalan korpostaton (-i) 58. Lerneja ĵurnalo aperanta en Hungario 60. Verbo de tempo (R) 62. Ripozhalto de soldatoj (R) 64. Kuŝmeblo (R) 66. Movos boaton sur akvo 68. Ternuksa planto (R) 70. „Armilo" de purigistino (-o) 72. Movigi al la antaŭa loko (-i) 74. Loganto de Egiptujo 76. Ilustraĵo 78. Hungaroj kuiras tiel 80. Parto de „Islamujo"! 82. Demanda pronomadjektivo en pluralo 83. Cefurbo de Ĉeĥoslovakio (R) 85. Ilinio kaj sulfuro 87. Verki (R) 89. Sufikso 91. Berilio



La ĝusta solvo de krucenigmo aperinta en la 1-a numero 1979 de Hungara Vivo: „Angore, orfe, en ĉagreno/ Gardantoj gardu sur posteno." Libropremion gajnis *Béláné Horváth,* Kalocsa, Dózsa tér 5-7. H-6300, *Valéria Kurucz,* Marcali, Kovács J. u. 59., H-8700, *Tibor Papp,* Debrecen, Trombitás u. 12., H-4031.

LETERKESTO

Kris Long, Bracknell, Britio: pensigan alparolon vi sendis pri temo de „Eblaĵoj de E-o" (nro 78/6), koran dankon! La provo prezenti ne-eruditon estas ja malfacila en Eo, ĉar ofte la simpla Ea parolstilo ŝajnas ne-erudita, kutime – ni do konsentas en tio, same pri la jam ekzistanta erudicia stilo, kiun karakterizas maloftaj vortoj kaj kompozitaj verboformoj (deziratas, ĝisekstreme ktp.). La literatura problemo por *„subkulturaj"* verkoj, ties tradukoj tamen restas solvindaj iel. Oni ne devas imiti kompreneble nacian lingvaĵon ĉar senutile, sed – laŭ nia koncepto – per *konvenaj* stil-distingoj iamaniere oni devas *speguli* sencon kaj senton de la subkulturaĵo. La vojoj tien ankoraŭ ne estas glatigintaj . . . viaj propraj provoj, i.a. en „Kancerkliniko" estas same studindaj de ni. Ni intencas daŭre okupiĝi – diversmaniere, por ne iĝi enua – pri E-aj stil-tavoloj, ĉar ili jam ekzistas, kaj meritas kultivadon.

Aldo de' Giorgi, Como, Italio: la fajron ni komprenas, kredu. Homa afero estas, kio manifestiĝas ankaŭ inter e-istoj, maltoleremo fronte al la rajtoj de aliaj lingvoj, dume ili postulas rajte toleremon por nia lingvo. Ĉe kelkaj ia Esperanta ŝovinismo regas, kaj repuŝi emas kio ne estas strikte Esperanta. La respektinda inklino ensorbi en nian grandiozan lingvon *ĉion eblan,* signifas samtempe *ĉion neeblan!* Oni serĉu en tia inklino la radikojn de la nove-denove aperantaj proponoj por Esperantigi nomojn, ortografion de fremdaĵoj, envortarigi frangajn aŭ bantuajn vilaĝajn oficojn, vestojn, ilojn de bredistoj k.s. Laŭ ni, vi pravas: vana aroganteco estas pretendi, ke Eo estu ĝisekstreme perfekta; kapabla fari, kion la aliaj lingvoj ne povas. Por ĉiu lingvo restas netradukeblaj fremdvortoj, eĉ ne transskribeblaj. Viaj kritikoj ĉiam atendataj!

HUNGARA VIVO

Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** * Responda redaktoro: **D-ro István Nagy.** Arta redaktoro: **Éva Farkas-Tatár.** * Redakta Komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Péter András Rados, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó Zsuzsa Varga-Haszonits** * Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechán, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** * Budapest, pk. 193. H–1368. Telefono: 141-078, 334-194. * Eldonas: Hungara Esperanto–Asocio *Responda eldonisto: **Tibor Vaskó.** * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215-96-162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 66,- al eksterlando por unu jaro 78,- forintoj. * Peranto al eksterlando: KULTURA, Budapest, P.O.B. 149. H–1368 Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,– Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. – 79-7003 S.m.Ny. 4000 – Responda gvidanto: Béla Farkas direktoro

ISSN 0018–7704. **Indexszám: 25 377**

Kvazaŭ reviviĝus LITERATURA MONDO . . .
– Lavango de libroj el Hungario –

Multaj favoraj recenzoj pruvas la sukceson de la granda eldona reviviĝo, okazinta dum la lastaj jaroj en Hungario. La nuna jaro tamen estas atuta: dum la ĝisnunaj sep monatoj eldoniĝis 11 novaj titoloj, sur pli ol 2000 paĝoj . . . Ĉiuj tiuj libroj – kaj ankaŭ la pli fruaj hungaraj eldonaĵoj – estas aĉeteblaj ĉe la Kongresa Libroservo en Lucerno. La sube montritajn prezojn uzas Hungara Esperanto-Asocio: ĉe la Kongresa Libroservo oni antaŭvidu iomete – je ĉ 10% – pli altan prezon. Trastudu do la liston, kaj ĝojigu vin per la plej inda kongresa suveniro – per belaj kaj interesaj Esperantaj libroj.

Libroj, aperintaj dum 1979:

Enciklopedio de Esperanto I–II. *(Represo de la unua eldono.)* 620 p., 23 cm. Prezo: 45,– ned. gld.
Gvidlibro por supera ekzameno *(Historio-Literaturo-Metodiko.)* 362 p., 19 cm. Prezo: 15,– ned. gld.

Baza literatura krestomatio *(124 tekstoj de 54 aŭtoroj.)* 262 p., 19 cm. Prezo: 13,80 ned. gld.

Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado *(Studoj de Drezen, Isajev, Lins ktp.)* 228 p., 19 cm. Prezo: 13,80 ned. gld.

V. Benczik: **Libro de romanoj** *(Resumoj de la romanoj de Vallienne kaj Luyken.)* 174 p., 19 cm. Prezo: 15,– ned. gld.

Hungaraj fabeloj *(Dek fabeloj.)* 100 p., 20 cm. Ilustrita. Prezo: 10,– ned. gld.

Hund-bazaro *(33 hungaraj porinfanaj poemoj.)* Ilustrita. 80 p., 19 cm. Prezo: 10,– ned. gld.

La steloj de Eger *(Luksa bildrakonto pri mezepoka batalo.)* 64 p., 23 cm. Prezo: 6,– ned. gld.

133 tagoj *(Artikoloj kaj literaturaĵoj pri la Hungara Konsilia Respubliko en 1919.)* 244 p., 19 cm. Ilustrita. Prezo: 12,– ned. gld.

Zs. Móricz: **Malriĉaj homoj** *(Tragika rakonto pri murdo.)* 36 p., 23 cm. Prezo: 2,50 ned. gld.

Zs. Móricz: **Ĉiela birdo** *(Drama amrakonto.)* 60 p., 19 cm. Prezo: 8,10 ned. gld.

Pli fruaj eldonaĵoj

Originala beletro kaj esperantologio

Auld–Dinwoodie–Francis–Rossetti: **Kvaropo** *(Poemaro.)* 252 p., 19 cm. Prezo: 18,– ned. gld.

Julio Baghy: **En maskobalo** *(Kvin unuaktaĵoj.)* 140 p., 19 cm. Prezo: 12,– ned. gld.

F. V. Dorno: **Satiroj** *(Sprita kontraŭreĝa satiro kaj krimkomedio kun Esperanto-kongresa fono.)* 140 p., 19 cm. Prezo: 12,– ned. gld.

Izrael Lejzerowicz: **El la „Verda Biblio"** *(Satiro pri la esperantistoj en Biblia stilo. Kun karikaturaj ilustraĵoj.)* 80 p., 19 cm. Prezo: 8,10 ned. gld.

Sándor Szathmári: **Kain kaj Abel** *(Noveloj.)* 276 p., 19 cm. Prezo: 16,50 ned. gld.

Ferenc Szilágyi: **Koko krias jam!** *(Noveloj.)* 200 p., 19 cm. Prezo: 13,80 ned. gld.

Lajos Tárkony: **De paĝo al paĝo** *(Literaturaj eseoj.)* 121 p., 19 cm. Prezo: 12,– ned. gld.

William Auld–Vilmos Benczik: **25 jaroj** *(Antologio de Belartaj Konkursoj 1951–1975.)* 208 p., 19 cm. Prezo: 13,80 ned. gld.

Esperantologiaj Kajeroj 2 *(Studoj pri diversaj aspektoj de Esperanto kaj ĝia kulturo, el la plumo de Frank, Tonkin ktp.)* 273 p., 24 cm. Prezo: 16,50 ned. gld.
Esperantologiaj Kajeroj 3 *(Plena verkaro de la hungara akademiano-esperantisto G. Bárczi en la hungara kaj Esperanto.)* 375 p., 24 cm. Prezo: 16,50 ned. gld.

Tradukita beletro

Endre Ady: **La morto de la ĉielarko** *(Poemoj kaj artikoloj.)* 90 p., 19 cm. Prezo: 10,80 ned. gld.

Mór Jókai: **La filoj de l' ŝtonkora homo** *(Bildrakonto, kun kolora frontpaĝo.)* 64 p., 24 cm. Prezo: 6,– ned. gld.

Géza Gárdonyi: **Sklavoj de Dio** *(Romano pri la mezepoka vivo en Hungario.)* 409 p., 20 cm. Prezo: 10,80 ned. gld.

Ferenc Molnár: **La knaboj de Paŭlo-strato** *(Elstara junulara romano.)* 188 p., 19 cm. Prezo: 13,80 ned. gld.

Aliaj libroj

A. Csiszár–K. Kalocsay: **6000 frazeologiaj esprimoj hungaraj-esperantaj** 188 p., 20 cm. Prezo: 13,80 ned. gld.

Esperanta-Kamboĝa Vortaro 148 p., 20 cm. Prezo: 18,– ned. gld.

Turista Kantaro *(51 kantoj kun muziknotoj.)* 84 p., 21 cm. Prezo: 6,50 ned. gld.

Programdeklaro de la Hungara Socialisma Laborista Partio 41 p., 19 cm. Prezo: 1,– ned. gld.

Sciencaj Komunikaĵoj 1977 *(Originale verkitaj studoj pri diversaj sciencoj.)* 100 p., 23 cm. Pr.: 12,- ned.gld.

Sciencaj Komunikaĵoj 1978 *(Originale verkitaj studoj pri ,diversaj sciencoj.)* 100 p., 23 cm. Pr: 10,- ned.gld.

Sciencaj Komunikaĵoj 1979 *(Originale verkitaj studoj pri diversaj sciencoj.)* 100 p., 23 cm. Pr.: 12,-ned.gld.

Balaton *(Poŝformata fotolibro pri la naturaj belaĵoj de la farna lago.)* Bindita. Prezo: 3,– ned. gld.

Komputilteknika Vortaro hungara–germana–angla rusa-Esperanta. 464 p., 19 cm. Prezo: 18,– ned. gld.

Libroj, aperontaj dum 1979

Frigyes Karinthy: **Vojaĝo al Faremido – Kapilario** *(Du romanoj)* Ĉ. 220 p.

Zsigmond Móricz: **Varmega kamparo** *(Romano)* Ĉ. 250 p.

István Nemere: **La naŭa kanalo** *(Originalaj noveloj)* Ĉ. 140 p.

Blazio Wacha: **Adolesko** *(Originala romano)* Ĉ. 260 p.

Árpád Abonyi-Nagy: **Historio de la Esperanta teatro** Ĉ. 350 p.

Gyula Krudy: **La rozo de l' sultano** (Fabelo) Ĉ. 40 p.

Endre Tóth: **Lappar, la Antikristo** *(Originalaj noveloj.)* Ĉ. 130 p.

EGER

TIEL NI KONSTRUAS



Tia estas kiam ĝi pretiĝis

MODERNA TUNELŜELAĴA KONSTRU–TEKNOLOGIO

TUNELŜELAĴ–SISTEMO PEVA

HEVES-MEGYEI TANÁCSI ÉPÍTŐIPARI VÁLLALAT
(KONSTRUINDUSTRIA ENTREPRENO
3301 EGER DE HEVES-DEPARTEMENTA KONSILIO)

Klapka str. 11. Telekso: 63337
Eksporto: NIKEX 1809 Budapeŝto
Mészáros út 48. Telekso: 22–4971, 22–6406

A. P.



Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

BÁV

Konsumturist



en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.
Hotel Intercontinental – Hotel Gellért